

EL POPOLA ĈINIO

中國報

5

2000

ISSN 1023-4361

BIBLIOTEKA UNIWERSYTECKA

KUL

Esp.
Ū-19034/2000



EPK POPOLA ĈINIO



“El Popola Ĉinio” kaj E-movado **20**



Eterna memoro **40**



Amikaj renkontiĝoj **47**

El nia foto-albumo **36**



10
EPĈ-anoj



EL POPOLA ĈINIO

3 INTER NI

4 Ĉe la 50-jara jubileo de EPĈ

5 **GRATULOJ AL LA ORA JUBILEO DE EPĈ**

8 Intervjuo kun s-ro Ĉ. Ĉen

15 Rememore al la unuaj jaroj de EPĈ

16 Fenestro por la legantoj

17 Amo al Esperanto

18 Pere de la okuloj de niaj raportistoj

19 **KORESPONDI DEZIRAS**

24 **OMAĜE AL LA ORA JUBILEO DE EPĈ:**

Unu jaro ĉe EPĈ

26 EPĈ 1950-2000

28 **ESP-NOVAĴOJ**

29 Mondfama ĉina filmostelulino Gong Li

32 Ĉi tie estas Wangfujing

43 Gastado ĉe esperantistoj eksterlande

45 Por paco kaj progreso de l' homar'

pli vigle agu ni en solidar'!

51 **OMAĜE AL LA ORA JUBILEO DE EPĈ:**

Benriĉa aktiveco de EPĈ dum 50 jaroj; Pluan

longan vivon al "El Popola Ĉinio"; Tion mi nomas

neelĉerpebleco; Estu plu firmaj viaj paŝoj

54 Energiaj emeritoj de "El Popola Ĉinio"

56 Verda juneco

58 **FOTOJ FARITAJ DE E-ISTOJ**

INTER NI

"El Popola Ĉinio" jam atingis sian 50-jariĝon. Kun granda ĝojo ni sendas varman saluton al niaj karaj legantoj kaj perantoj. La nuna numero estas memoriga por la 50-a datreveno de la naskiĝo de nia revuo kaj ni malpliigis raportaĵojn kaj artikolojn sub iuj rubrikaj por aperigi la memorigajn artikolojn. El la artikoloj "'El Popola Ĉinio' kaj E-movado" kaj "Rememore al la unuaj jaroj de EPĈ" vi povas koni la pasintecon de nia revuo, kaj la artikoloj "Eterna memoro", "Energiaj emeritoj de 'El Popola Ĉinio'", "Amo al Esperanto", "Verda juneco" k.a. konigas niajn funkciulojn en diversaj periodoj kaj iliajn laborojn.

En la lastaj tagoj ni ricevis multajn gratulajn leterojn de diverslandaj legantoj. Pro tio ni esprimas koran dankon al ili. Karaj samideanoj, ni kune iru antaŭen por nia idealo en la nova jarcento.

La Red.



Omaĝe al la Ora Jubileo de EPĈ

Projektinto: LÜ DONG

Okaze de la 50-jariĝo de EPĈ ni aperigas tiun ĉi memorigan numeron 500-an. La okulfrapaj verdaj steloj kaj malnovaj numeroj de EPĈ sur ĉi kovrilpaĝo montras la karakteron kaj iritan vojon de nia revuo, kaj la ruĝa koloro feliĉo-simbolanta en Ĉinio prezentas nian esperon, ke EPĈ havu belan estontecon.

EL POPOLA ĈINIO

Monata gazeto, eldonata

de Ĉina Esperanto-Ligo

Redaktata de Redakcio de

"El Popola Ĉinio"

Distribuata de Distribua

Fako de "El Popola Ĉinio"

Direktoro: Wang Xifu

Adreso: P.O. Kesto 77,

Beijing 100037, Ĉinio

Telefono kaj telefakso:

+86-10-6832 1808

Retpoŝto:

epc@china-report.com

Hejmpaĝo:

<<http://www.china.org.cn>

/ElPopolaCxinio>

5[500]2000

Ĉe la 50-jara jubileo de EPCĈ

En majo de 2000 EPCĈ jubileas sian 50-jariĝon, kaj la maja numero ĝuste estas la 500-a.

50 jaroj ŝajne ne estas mallonga tempo por revuo de "malgranda lingvo". Kiel redaktoroj de la revuo, ni ofte falas en emociiĝon rememorante la pasintajn jarojn. En la pasintaj dekoj da jaroj, malgraŭ sia malgrandeco kaj alies strabo, EPCĈ firmaŝe iris antaŭen.

Eble iuj miris, kial la revuo de "malgranda lingvo" povis daŭri 50 jarojn. Ni atribuas tion al la avantaĝoj de la Esperanta revuo mem, ke Esperanto havas mirindan vivipovon. Ĝi kiel lingvo neŭtrala, praktika kaj facile lernebla havas superecon antaŭ la naciaj lingvoj. Dank' al la neŭtraleco ĝi ne trovis limigon de naciecoj kaj regioneco en sia disvastiĝo kaj sekve de tio esperantistoj troviĝas en ĉiuj anguloj de la mondo, kaj la revuo povas vaste disvastiĝi. Estas simpla vero: La senvalorajoj ne povas longe ekzisti. De la naskiĝo de la lingvo, senombraj esperantistoj pere de praktikado, konvinkas la homojn pri ĝia valoro. EPCĈ estas unu el ili.

Ĉi tie ni sendas nian sinceran saluton al niaj legantoj. La faktoj pruvis, ke ili ne estas ordinaraj legantoj, la interrilatoj de la legantoj kun la revuo kaj ĝiaj redaktoroj ne estas ordinaraj. Tiaj interrilatoj estis klare eksplikitaj de nia kroata leganto en la letero: "Via revuo ne estas nur ĉina. Ĝi helpas al ĉiuj legantoj senti apartenon al la internacia Esperanto-komunumo. Imagu la sperton, kiam mi renkontas iun nekonatan vojaĝanton en aŭtobuso, kiu foliumas 'El Popola Ĉinio'. Mi sentas ne ke li legas ĉinan revuon, sed ke li rilatas al la aferoj al kiuj ankaŭ mi apartenas." Tia letero ne estas unika. Kial ili tiel diris? Esperantistoj facile komprenas, ke la afero, por kiu ni batalas, estas komuna, kaj ni estas kunbatalantoj por la nobla idealo. Laŭ tia

klarigo, Esperanta revuo ŝatata de la legantoj nature ne havas landlimon.

En la artikoloj en ĉi tiu numero ni mencias la nomojn de multaj legantoj kaj iliajn kortuŝajn aferojn. Estas ne eble por ni mencii ilin ĉiujn, sed ili ĉiam estas en nia koro!

Esperanto estas kreita sur la bazo de eŭropaj lingvoj. Ĉu oni povas uzi ĝin por konigi la multe diferencajn ideologiojn kaj kulturon de la Oriento? Ĉu ĉinoj kutimaj al ideogramoj povas posedi kaj praktiki Esperanton? Tio koncernas la internaciecon de Esperanto. Praktikado en dekoj da jaroj de EPCĈ donis jesan respondon. Granda nombro da artikoloj raportis ne sole ordinarajn interŝanĝojn kaj ĉiutagan vivon, sed ankaŭ la senkompare pompan kulturon de Ĉinio inkluzive ideologion, filozofion, medicinon, literaturon, arkitekturon k.a. Kvankam iuj el niaj raportaĵoj, kiel niaj legantoj kritikis, portas "orientajn spurojn" kaj "ĉinisman", tamen tion ni atribuas ne al la lingvo mem, sed al la nealteco de nia lingvonivelo. Multaj legantoj skribis al ni, ke ili konas Ĉinion ĉefe per nia revuo, kaj ili esprimas dankon al la redakcio. Ni estas tre feliĉaj, ke niaj legantoj komprenas niajn raportaĵojn, sed ni volus diri, ke ni devas danki nian komunan lingvon. Ni pli bone lernu kaj disvastigu ĝin.

Ni ne scias, kion ni renkontos sur nia antaŭa vojo, sed ni firme kredas, ke ĉiaj malfaciloj submetiĝos antaŭ ni kaj nia lingvo certe kreos pere de sia avantaĝo verdajn oazojn, se ni persistos same kiel antaŭe, harmonie klopodos por nia komuna celo kaj paco de la homaro. Ni memoru la vortojn de nia leganto: "Ne estu pesimismaj, nek plendu ke aliaj ne atentis nin, sed ni demandu nin mem, kion kaj kiom ni faris por nia afero."

La Red.

Estimataj,

Okaze de la 50-jariĝo de "El Popola Ĉinio" kaj aperigo de ĝia 500-a numero mi sendas al vi sincerajn, elkorajn salutojn, bondezirojn kaj gratulojn pro viaj grandaj sukcesoj dum la pasintaj jaroj.

"El Popola Ĉinio" estas unu el la plej ofte legataj Esperanto-gazetoj en la mondo, eble la plej ofte legata. Ĝi estas legata de homoj ne nur en Ĉinio sed ankaŭ en ĉiuj aliaj landoj, kie troviĝas esperantistoj — la landoj de Eŭropo, multaj amerikaj landoj, en Afriko,



Aŭstralio, Nov-Zelando, Israelo, Japanio kaj Vjetnamio. Mi esperas ke baldaŭ ankaŭ esperantistoj en iuj el la pacifikaj insuloj eklegos ĝin.

Ni ĉiuj scias ke la popoloj de la mondo havas pli ol sufiĉajn internaciajn kaj intertnajn malfacilaĵojn, iuj pli ol aliaj,

kaj mi sincere kredas ke la plej bona maniero solvi tiujn estas plifortigo de sento de pli intima amikeco kaj kunlaboro ne nur inter la naciaj ŝtatregistaroj de la mondo, gravas kiel tio estas la kreskantaj nombroj de internaciaj Neregistaraj Organizoj [NRO-j] ankaŭ kiuj gravas, sed ankaŭ kaj grave, inter la ordinaraĵoj popoloj de la mondo.

En ĉiuj tiuj gravaĵoj, la uzo de la internacia lingvo Esperanto utilas kaj multege helpas atingi tian bezonatan amikiĝon kaj interkompreniĝon. Esperantistoj kiel unuopuloj povas helpi. Via atestimata gazeto "El Popola Ĉinio", fundamentas tiurilate.

Mi deziras ke EPĈ havu bonan festjaron kaj ke almenaŭ aliaj 50 fruktodonaj jaroj plue atendu ĝin.

Ree, gratulojn kaj korajn dankojn pro viaj laboroj.

Kep Enderby,
prezidanto de UEA

En la nomo de KAEM (Komisiono pri Azia Esp-Movado de UEA) mi plenkore gratulas vian gazeton pro la 50-jariĝo kun 500 numeroj.



En la monda Esperantujo via gazeto estas jam stabila modelo de Esp-periodaĵo kaj samtempe simbolo de ĉina kaj azia Esp-movado. La rimarkinda tempodaŭro de duonjarcento, kiun via gazeto ĝis nun travivis, mem klare spegulas la historion de la movado en via lando kaj elmontras al la mondo latentan energion kaj kapablon de ĉinaj esperantistoj.

Mi elkore esperas, ke kun la brila disvolviĝo de la nuna ĉina ekonomio via gazeto ankaŭ daŭre prosperos kaj fidele plenumos la taskon de Esp-gazeto en la monda Esperantujo.

Puramo Chong,
prezidanto de KAEM

Preskaŭ ĉion, kion mi scias pri Ĉinio, mi ŝuldas al "El Popola Ĉinio".

Tio povus ŝajni troigo, sed ĝi ne estas. Certe en la itala lernejo mi lernis pri Marko Polo kaj lia vojaĝo. Mi eble lernis ankaŭ, ke la ĉefurbo de Ĉinio estas Bejĝing-o (Pekino, ni diris tiam), sed mi ne lernis multon plian.

La ceteraj neesperantistaj italoj ankaŭ scias pro la gazetoj kaj la televidaj dissendoj pri Maŭ Zedong kaj pri "la kvaropa bando". Ili scias ke ĉinoj estas multegaj kaj ke iam ni sukcesos invadi ilin per FIAT-aŭtomobiloj. Per tio ĝenerale finiĝas la scioj de neesperantistaj italoj pri Ĉinio.

La esperantistoj, kaj ĉefe la malnovaj esperantistoj kiel mi, travivis la evoluon de Ĉinio dum la lastaj jardekoj tre pli intime, kvazaŭ ili estus parto de tiu evoluo. EPĈ daŭre ŝanĝiĝis kaj adaptiĝis al la ĉina ŝanĝiĝanta situacio, tiel ke ni kunsupertis tion, kio okazas en Ĉinio, de la tempo



kiam vastaj amasoj svingis la ruĝan libreton ĝis hodiaŭ, kiam vastaj amasoj partoprenas la modernigon de la lando.

Certe neniu italo eĉ suspektas pri la ekzisto de ĉinaj malplimulto, pri kiuj EPĈ regule raportas, kaj pri Tibeto neesperantistoj aŭdas nur la raportojn pri la vojaĝoj de la estro de la en-ekzila registaro.

Do, kiel vi vidas, efektive mi scias preskaŭ ĉion pri Ĉinio nur danke al EPĈ.

Mi ne povas ne aldoni personan anekdoton. Dum la lastaj jardekoj multaj aferoj ŝanĝiĝis ankaŭ en Italujo kaj ĝenerale en la Okcidento. En la fino de la sesdekaj jaroj, kiam mi komencis legi EPĈ-on, iun tagon vokis min la loka polico, ke mi iru al la policejo. Tie oni demandis min, kial mi legas tiun ĉinan gazeton, kaj informis min pri tio ke mi estas sur la listo de homoj, kiuj havas rilatojn kun komunismaj registaroj. Nenio alia okazis. Tiuj estis la lastaj sekvoj de la politiko de malvarma milito, kiu intertempe ankaŭ ĉi tie estis forlasita.

Dankon, EPĈ pro la riĉigo de mia vivo pere de vi!

Renato Corsetti,
viceprezidanto de UEA

Estu forta motoro de la monda Esperantujo

Nome de la Korea Esperanto-Asocio kaj ĝiaj membroj, mi esprimas mian elkoran gratulon, okaze de la 500-a jubilea numero de El POPOLA ĈINIO! En la monda Esperantujo, 500-a jubilea numero aŭ 50-jariĝo de gazeto ne estas ordinara jubileo sed speciala evento enviinda.

EPĈ havas tri bonajn punktojn. Unue, EPĈ aspektas bela kun multaj bonaj kolorfotoj sur bonkvalita papero, kaj aperas regule. Ĝi estas la plej dika monata gazeto en la tuta Esperantujo. Due, la enhavo estas riĉa je ĉinaj historio, kulturo kaj vidindaj lokoj. Estas bona legaĵo pri Ĉinio. Trie, la

Esperanto uzata en la gazeto estas altnivela. Estas malfacile esprimi tradiciajn orientajn historiaĵojn kaj kulturaĵojn, sed la ĉinaj vortoj kaj esprimoj tradukitaj en Esperanton en EPĈ estas bone kompreneblaj. Mi sendas varman aplaŭdon al EPĈ.

Pro tio ke EPĈ estas tiel bona kaj tiel populara gazeto, mi petas al EPĈ ke ĝi donu pli da spaco pri Esperantonovaĵo en Ĉinio kaj ankaŭ en Azio. Estas evidente ke en la 21-a jarcento Ĉinio ludos gravan rolon en internacia politiko kaj ekonomio. Ĉinio povos kaj devos ludi pli fortan rolon ankaŭ en internacia lingva politiko. Tio signifas ke Ĉinio povos



esti la ĉefa motoro antaŭenpuŝi Esperanton en Unuiĝintajn Naciojn kaj aliajn interŝtatajn organizojn, por kontraŭstari disvastiĝantan hegemonion en internacia lingva komunikado. Por tio, EPĈ estos la ĉefa ilo disvastigi la ideon de la internacia neŭtrala lingvo Esperanto en Ĉinio kaj ankaŭ en la tuta mondo. En tia senco, EPĈ havas grandan respondecon en la nova jarcento.

Samtempe, estas la devo de la tutmonda Esperantujo subteni kreskiĝon de EPĈ.

LEE Chong-Yeong,
prezidanto de la
Korea E-Asocio

Gratulon al la duona jarcento de "El Popola Ĉinio" esprimas la prezidanto de la Japana Esperanto-Instituto.

La enkonduko de Esperanto en Ĉinion okazis antaŭ jarcento. Poste la movado suferis — unu el la kialoj kuŝas je la mano de la imperiisma Japanio —, sed tamen pluvivis Esperanto. Kaj en 1950 vi fondis la gazeton "El Popola Ĉinio". Poste, via vojo ne estis plata, kaj la monda situacio ricevis ŝanĝojn. Sed mi vidas, ke "El Popola Ĉinio" markis, en la lingvo de la tutmonda idea loĝantaro, la arĥivon de la vivo ĉina. Permesu al mi personan komenton — ĉar ankaŭ mi naskiĝis en 1950-1960aj jaroj kiam mi eklernis Esperanton, via gazeto alportis al mi la scenojn de la lando al mi fremda. Kaj tamen lastatempe, mi vidas vialandanojn ne fremdaj sed familiaraj.

Tio estas parte pro mia kreskiĝo, sed estas parte pro la pli familiariĝinta informado el via lando, kies ĉekapa kuranto estas ĝuste "El Popola Ĉinio".

Mi esperas plian kaj pluan aktivecon de via gazeto.

SIBAYAMA Zyun'iti,
prezidanto de la Japana E-Instituto

Estimataj samideanoj!

Kun ĝojo mi gratulas vin pro via jubileo: 500 numeroj! Tiom da jaroj seninterrompe vi jam informas la tutmondan esperantistaron pri via lando, pri tio kio okazas tie, kaj — por mi persone eĉ ankoraŭ pli grave — pri la ĉina kulturo. Estu la 50-a jarkolekto la komenco de nova fervoro. Krom via revuo, ĉiam belkolora, ĉiam bone informa, el via grandega lando ankaŭ libroj en Esperanto de temp' al tempo ĝojigas nin. Tamen, kion mi priĝojas en tiaj libroj (mi pensas ekzemple pri la grandioza trivoluma romano Ruĝdoma Songo, kiun mi ĝuegis), nome la ekkonon pri via multjarcenta kultura tradicio tiom riĉa kaj varia, tion mi ne povas trovi samprofunde en via revuo.

Sed estus maljuste atendi ion tian de revuo. Tion mi konscias. Aliflanke, via revuo per siaj multmilaj ilustraĵoj scipovis liveri alian bildon pri via lando, kian multaj literaturaj tekstoj ne povas transdoni same fidinde.

Do, entute: gratulegon! Kaj brave antaŭen! Ek al la sekva jubileo!

Gerrit Berveling,
prezidanto de EVA kaj redaktoro
de FONTO

Karaj geamikoj,

Tre koran gratulon el Kroatio okaze de via rara jubileo, la 500-a numero kaj 50-jara ekzisto de El Popola Ĉinio. Via revuo spegulis dum la pasintaj 5 jardekoj la evoluon de Ĉinio. En multaj regionoj de la mondo ĝi alportis informon pri Ĉinio kaj kuraĝigis pri Esperanto. Sen ĝia ekzisto nia esperantista komunumo estus multe multe pli magra.

Ni deziras al vi ke via registaro senkondiĉe kaj malavare subtenu vin estonte por povi plu disporti la novaĵojn pri via lando tra la mondo. Dankon ke vi flegis kaj kreskigis nian lingvon dum la kvinjardeka kontinuo. Ni en Kroatio levas la glason por via jubileo, en la jaro kiam nia revuo Tempo atingis nur modestajn 20 jarojn. Kaj ni scias kiom da homa energio necesis por tia atingo.

Kun estimo ni memoras la homojn kiuj iniciatis la ĉinan E-revuon, kaj kies nomliterumon ni ne bone konas sed iliajn atingojn jes.

Vivu longe la plej konata azia flegejo de Esperanto, survoje al novaj vivdefioj.

Spomenka Štimec por Kroata Esperanto-Ligo

Karaj geamikoj de "El Popola Ĉinio",

Certe nia Esperanta mondo estas ege vasta. Oni povas tion konstati, kiam la bonefika influo de la bela "El Popolo Ĉinio" estas vidata eĉ en Bugalagrande, tre malgranda vilaĝo de Kolombio.

En natura maniero la eksterordinara lando Ĉinio estas eĉ ni malpli malproksima per tiu presita kaj mirinda spegulo de la ĉina vivo.

Nome de la kolombia esperantistaro mi deziras esprimi miajn plej varmajn gratulojn al ĉiuj personoj, kiuj dum 50 jaroj ebligis al ni spiri ĉiumonate iom el la rava kaj ŝatinda ĉina vivmaniero per la nekomparebla "El Popola Ĉinio".

Korkore,

Ruben Torres, prezidanto de la Kolombia E-Ligo

Karaj redaktoroj!

Mi salutas vin ĉiujn en la jaro 2000 kaj gratulas vin okaze de via 50-jariĝo. Mi deziras al vi sukcesan laboron por 2000 kaj por la sekvaj 50 jaroj.

Amike,

Bernard Golden

Karaj gesamideanoj,

Okaze de la 50-jariĝo de la belaspekta kaj riĉenhava revuo El Popola Ĉinio ni varme gratulegas vin.

Brazila Esperanto-Ligo

Kvankam ne estas tiel facile akiri ekzempleron de EL POPOLA ĈINIO, tiuj, kiuj falas en niajn manojn, estas avide legataj kaj enmanigitaj al alia samideano, por ke li/ŝi povu ĝin ĝui... ĉar inter aliaj aferoj, EPĈ estas, miaopinie, la plej grafike bela revuo en Esperantujo. La fotoj, ekzemple, estas ĉiam belegaj kaj altkvalitaj, kaj la artikoloj ĉiam interesaj.

Kuba Esperanto-Asocio

Estimataj gesamideanoj,

Ukrainia E-Asocio tutkore gratulas vin okaze de via duobla jubileo: 50-jariĝo kaj 500-a numero de EPĈ.

Estu sanaj kaj prosperaj.

Viktor Pajuk, vicprezidanto de Ukraina E-Asocio

Karaj redakcianoj de EPĈ,

Mi ĉiam (ekde 1982 aŭ 83 kun kelkjara paŭzo post 1989) legas vian revuon. Ĉefe interesas min novaĵoj rekte el Ĉinio, pri kio mi jam revas ekde mia juneco (40 jaroj); via kurso de la ĉina lingvo eĉ instigis finfine lerni en popolaltlernejo vian lingvon. Kaj mi tre ĝojas ke vi de tempo al tempo uzas la interesajn kaj belegajn ĉinajn poŝtmarkojn.

Kion mi ĉiam entute legas, estas viaj raporto pri la lando kaj pri la homoj, pri industrio kaj nun pli kaj pli pri ekologio.

Min interesus, kioma grade ekzistas reciklado de papero (k.a.) en via lando. La reciklado helpas savi arbojn, kaj saĝa uzado ankaŭ.

Kaj mi deziras al ĉiuj redakcianoj, kelkaj konataj al mi, kaj al la ĉinaj gesamideanoj bonfarton, sanon kaj longan vivon.

Mi diru (faru) "bainian" okaze de la draka jaro.

Amike,

**Manfred Westermayer,
sekretario de Asocio
de Verduloj Esperantistaj**

Intervjuo kun s-ro Ĉ. Ĉen

En la jaroj, kiam imperiistoj agresis nin kaj nia nacio estis minacata de pereco, la slogano *savi la nacion per sciencoj* ja estas nerealegebla, tamen nia lingvo Esperanto ludis gravan rolon en savo de la nacio

de PANG NAIYING


MEZE de marto la vintra frosto ankoraŭ ne cedis al la printempa varmeto en Pekino. Post pluveto la aero fariĝis multe pli freŝa ol antaŭe. Je la 10-a matene mi atingis la domon de s-ro Ĉ. Ĉen (Zhang Qicheng). Mi premis la butonon de la sonorilo, kaj malfermis la pordon juna servistino.

La maljuna Ĉ. Ĉen sidis sur sofo kaj afable akceptis min.

"Estimata sinjoro, kiel vi fartas?" mi salutis lin laŭte. Tion tamen ne aŭdis la maljunulo eĉ kun fonoforo. Mi do proksimiĝis al li kaj ripetis miajn vortojn tuj ĉe lia orelo.

"Bone. Dankon!" li kapjesis. "Tamen la piedoj estas malfortaj kaj la oreloj ne bone funkcias. Mia surdeco estas stranga, ke la oreloj ne bone aŭdas precipe virinan voĉon. Ŝajne ili diskriminacias kontraŭ la virinoj," ridegis la maljunulo.

Lia laŭta rido konsciigis min, ke estante 87-jara maljunulo, li estas malforta nur fizike, sed vigla spirite. Antaŭ nelonge li verkis por nia revuo artikolon pri konfuceanismo. Mi konis lin ĝuste pere de la artikoloj pri la ĉinlingva kulturo, kiujn li verkis en la lastaj jaroj. En mia memoro li ĉiam malrapide kaj lame iris al nia oficejo, kun sia verko. Li estas unu el la fondintoj de "El Popola Ĉinio" kaj ĉefredaktis ĝin de 1979-1983. Post sia emeritiĝo



Zhang Qicheng (la dua de maldekstre) kun alilanda e-isto

li restas aktiva aŭtoro de nia revuo.

Lia malbona aŭdado malhelpis nian interparolon, kvankam ni sidis tute proksime. Mi do skribis miajn demandojn sur papero.

"S-ro, mi informiĝis, ke vi, 15-jara, ekamis Esperanton tuj post via konatiĝo kun ĝi. Mi volus scii, kio en la lingvo tiel forte interesis vin?"

"En la 20-aj jaroj de la 20-a jc. nia lando estis malriĉa kaj malforta kaj tiam la patriotaj gejunuloj senescepte deziris savi la nacion per sciencoj," li respondis post momenta pripensado. "Tiel pensis ankaŭ mi kaj mi lernis la anglan lingvon, esperante, ke plenkreskinte, mi povos enkonduki la avangardajn

sciencojn kaj teknikon en Ĉinion. Tamen la angla lingvo estas malfacila. Foje mi hazarde trovis artikolon konigantan Esperanton en Studenta Revuo eldonita de la Komerca Presejo. Leginte ĝin, mi sentis, ke Esperanto estas ege bona, ĉar en ĝi estas neniu malfacilo, kia ĉe la angla lingvo. Ĝi estas pli facila ol multaj aliaj lingvoj. Mi pensis, ke estos bone, se ni sukcesos enkonduki en Ĉinion la alilandajn avangardajn sciencojn kaj teknikon en Ĉinion per tiu lingvo. Tiam la Ŝanhaja E-Asocio funkciigis korespondan kurson de Esperanto. Mi anoncis min por la lernado. Post duonjaro mi povis skribi leteron en tiu lingvo, tial mi havis pli grandan intereson kaj pli bone konis ĝian utilecon."

"Tamen per Esperanto vi ne realigis vian antaŭan deziron," mi diris laŭte.

"Ho, jes. En la jaroj, kiam imperiistoj agesis nin kaj nia nacio estis minacata de perejo, la slogano *savi la nacion per sciencoj* ja estas nerealegebla, tamen nia lingvo Esperanto ludis gravan rolon en savo de la nacio. Tiam nia slogano estis *Per Esperanto por la liberigo de Ĉinio*." Je tio li stariĝis kaj malrapide movis sin en la studĉambron, de tie li prenis mimeografitan bultenon kaj montris ĝin al mi. "Rigardu! Tio estas nia Esperanta bulteno por eksterlandaj esperantistoj. Ĝi konigis kruelaĵojn de japanaj agresantoj, la batalon de la ĉina popolo kaj la faŝistan teroron de la kuomintanga registaro en la kultura rondo. Tiu sekreta periodaĵo povis esti preteratentita de la kuomintanga registaro ĝuste pro tio, ke ĝi estis skribita en Esperanto. En tiuj jaroj Esperanto ne nur malfermis sekretan kaj sekuran vojon por informi la eksteran mondon pri realaĵoj de la Kontraŭjapana Rezistmilito de la ĉina popolo, sed ankaŭ gajnis por nia popolo la internacian simpation. Ĉar diverslandaj esperantistoj estas pacamaj kaj oponantaj kontraŭ milito, ili kredis, kion la ĉinaj samideanoj diris. Ricevinte tiujn bultenojn, ili represis la informojn en sia loko. Ĉu tio ne estis ĉarmo de Esperanto?"

La bulteno en la mano de la maljunulo estas flaveta. De ĝi mi sciis, ke komence la bulteno estis skribita mane kaj poste mimeografita. Pro militaj tumultoj nur tre malmultaj konserviĝis kaj tiu ĉi ekzemplero estis konservita de japana samideanino kaj poste ŝi donacis ĝin al s-ro Ĉ. Ĉen. Ĝi montras, ke en la jaroj, kiam la ĉina popolo estis turmentata de japanaj

agresantoj, ĝi ricevis simpation ankaŭ de la japana popolo.

"Se oni diris, ke en la militaj jaroj Esperanto ludis sian apartan rolon, kian rolon do ĝi ludis post la naskiĝo de la nova Ĉinio?" Mi etendis al li la paperon kun miaj demandoj.

"Ankaŭ nun ĝi estas nemankigebla," aldonis la maljuna sinjoro. "Por la ekonomia konstruado ni deziras ne nur pacan internacian medion kaj subtenon de pli da amikoj, sed ankaŭ, ke la alilandaj popoloj pli bone konu la novan Ĉinion. Tuj post la naskiĝo de la nova Ĉinio fondiĝis en Pekino la Internacia Buroo de Informoj. Limigite de la kondiĉoj, en la komenco ni povis eldoni librojn kaj gazetojn nur en la angla lingvo. Tiam naskiĝis ankaŭ nia Esperanta revuo 'El Popola Ĉinio', kies legantoj troviĝis tra la tuta mondo."

"Kian tradicion 'El Popola Ĉinio' devas heredi de la antaŭaj Esperantaj gazetoj?"

"Ni devas diri ĉiam veron, sed neniam fanfaroni. Por allogi la legantojn, ni publikigis pli da interesaj materialoj," aldonis la maljuna sinjoro. "La artikolo *Almozulo Fariĝas Distriktestro* en la unua numero de nia revuo ja montras la ŝanĝiĝon de la sorto de la ĉina popolo. Nia bulgara samideano tradukis ĝin kaj publikigis ĝin en fama bulgara ĵurnalo, kaj ĝi bone impresis bulgarojn. Tio montris la efektivan utilecon de nia lingvo. Tamen en la periodo de la kultura revolucio nia revuo fariĝis ekstreme maldekstra kaj ĉiam parolis kun instrua tono, kaj pro tio la legantoj ne ŝatis ĝin. Tiun mankon ni riparis poste. Nun 'El Popola Ĉinio' fariĝis denove ŝatata de la legantoj. Antaŭ kelkaj jaroj aperis la rubriko 'Temo Proponita de Legantoj', dank' al kiu

mallongiĝis la distanco inter la redaktoroj kaj legantoj."

"Estimata sinjoro, vi iam diris, ke vi ne plu verkos post la fino de la artikolo pri la ĉina lingvo kaj la ĉina kulturo. Sed post tio vi verkis alian artikolon pri la rilatoj inter konfuceanismo kaj la homa paco kaj disvolviĝo en la 21-a jarcento. Ŝajne vi bedaŭras kion vi diris, ĉar vi tre amas verkadon."

"Vere. Paco, amikeco kaj disvolviĝo estas ne nur nobla idealo de la esperantistoj, sed ankaŭ deziro de la tuta homaro. Sed hodiaŭ la homaro alfrontas diversajn problemojn: milito, poluo de la medio, dekadenco de moralaj... Kiel solvi ilin? Multaj malproksimvidaj personoj aktive esploras tion. 75 Nobel-premiitoj publikigis komunan manifeston, en kiu ili alvokis la tutan mondon: 'Por la homa vivo en la 21-a jc. oni devas heredi konfuceanismon, kreitan antaŭ 2 000 jaroj.' Kio estas la inteligenteco de Konfuceo? Kial ĝi estas utila por sanigo de la homa spirito kaj riparo de la sociaj difektoj? Jen kion mi volas klarigi en la artikolo."

"Mi deziras sanon al vi. Mi aŭdis, ke via vidkapablo estas malforta."

"Mi suferas de katarakto. Dank' al kolirio mi povas legi kaj skribi kun okulvitroj, tamen malfacile. Sed mi ne povas bone ĝui televidon. Sen helpo de la oreloj mi povas nur rigardi, kaj sen teksto sur ekrano mi ne konas la enhavon de la televidaĵoj. Antaŭe mi pensis, ke surdeco estas negrava, ĉar fonoforo min helpas, sed poste mi eksciis, ke fonoforo helpas nur aŭdadon, sed nesentemeco de la cerbo malhelpas min en kompreno de la sonoj, tamen mia pensado estas vigla."

Je tio la maljunulo ĝoje ekridis. ■



Samideanino de EPĈ en sporta konkurso

EPĈ-anoj





Fotisto Liu Sigong (la dua de maldekstre) kun ujguroj en Xinjiang



Distribuantoj



Komputiloj anstataŭis tajpilojn.





Sur Wutai-monto en 1994






Ĉe lago



Balo dum la 40-jara jubileo de EPĈ



Ĝojo sur azeno



Pang Naiying interjuanta kun monaho



Vizito de...



Preferinda amuziĝo

En kamparo



Rememore al la unuaj jaroj de EPĈ

Tiam por EPĈ laboris kvin personoj, kaj la labordivido ne estis rigora. Ĉiuj laboris absorbiĝe laŭ sia plej ebla povo

de LIAO ZHIGEN

EN februaro de 1952 mi venis al Pekino kaj eklaboris por EPĈ. Ĝi tiam estis presita per ĵurnala papero kun formato 27 cm X 39 cm. Tiam eĉ ĝiaj nigra-blankaj fotoj presiĝis malklaraj pro la maldelikateco de la papero. Ni ofte aperigis lignogravuraĵojn kaj papertondaĵojn ĉinstilajn por vigligi la paĝaranĝon. Tio faris la revuon plaĉa kaj rikoltis aprobon de la legantoj.

La nova Ĉinio estis en la unuaj jaroj post sia fondiĝo, kaj ĉiuj personoj estis malpostulemaj ĉu en la laboro ĉu en la vivo. Ni laboris en unu ĉambro de pli ol 20 kvadrataj metroj. Spertinte la mizeron de multjara milito, la personoj, kiuj venis el diversaj lokoj de la lando, estis tre ĝojaj, ke ili povas labori en la ĉefurbo. Sur ilia vizaĝo ofte vidiĝis rideto post multjara korpreniĝo kaj vido de espero.

Tiam por EPĈ laboris kvin personoj, kaj la labordivido ne estis rigora. Ĉiuj laboris absorbiĝe laŭ sia plej ebla povo, neniuj parolis laŭte aŭ babilis en la kabineto. Se iu volis konsiliĝi kun alia pri laboro, tiu invitis lin mallaŭte en koridoron aŭ korton por ne ĝeni la aliajn. Tiam en la redakcio de EPĈ mi estis la plej juna, tial mi prenis sur

min multajn laborojn, kiaj korektado de provpresaĵo, Esperanta korespondo, distribuado, buĝeto, interligado kun la presejo, poste bildoelekto kaj paĝaranĝo. Foj-foje mi devis prizorgi aĉeton de filmobiletto kaj ekskurson de

Japanio, Norda kaj Suda Amerikoj, Eŭropo, aliaj landoj kaj regionoj, kaj poste sendi la pakaĵojn al la poŝtoŭficejo.

Nia koresponda laboro inkluzivis leteroskribadon al perantoj kaj alilandaj Esperantaj organizoj, respondon al la leteroj de niaj legantoj. Ni ĉiam havis entuziasman kaj sinceran kontakton kun la legantoj. Ankaŭ ili donis al ni entuziasman subtenon, el ili iuj tradukis niajn artikolojn en sian lingvon kaj publikigis ilin en sialokaj ĵurnaloj kaj revuoj, kaj per tio pliigis la konon de tiulokaj popolanoj pri Ĉinio kaj fortigis la amikecon, iuj poste fariĝis niaj perantoj en multaj jaroj.

Tiam ni loĝis en unuetaĝa domo sen radiatoroj kaj vintre ni varmigis la ĉambron per bruligo de karbobuloj.

Kvankam la vivkondiĉoj ne estis bonaj, tamen ni gaje vivis kaj laboris por Esperanto, kaj la interhomaj rilatoj estis harmoniaj.

Forpasis palpebrume pli ol 40 jaroj, kaj la tiamaj junuloj jam fariĝis grizuloj. Ankaŭ nia EPĈ maturiĝis kaj fariĝis revuo kun certa reputacio en la Esperantujo. Ĝi havas propran redaktistaron kaj junajn esperantistojn. Mi povas diri, ke kun senĉesa disvolviĝo de Esperanto EPĈ havos pli brilan kaj belan estontecon. ■



La aŭtoro (maldekstre) kaj lia kolego

la kamaradoj al pitoreskejoj.

Tiam EPĈ ne havis sian propran redakcion kaj dependis de la redakcio "Popola Ĉinio". La artikoloj en la ĉina lingvo elektitaj de EPĈ unue estis tradukitaj en Esperanton, kaj s-ro Zhang Qicheng ekzamenis kaj reviziis la tradukaĵojn.

Kiam la nova numero de EPĈ eldoniĝis, ni ĉiuj tuj komencis streĉan distribuadon: enmeti la revuojn en kovertojn, surglui adres-etikedojn, stakigi la sendaĵojn laŭ la direktoj al

Fenestro por la legantoj

En la pasintaj 50 jaroj la legantoj multe kortuŝis nin per sia sincereco. Pluraj el niaj perantoj energie propagandis por nia revuo kaj eĉ dum sia vojaĝo kunportis abonilojn. Inter niaj legantoj ne mankas dumvivaj abonantoj

de NI DONGYANG*

NIA redakcio havas apartan sektion, kiu respondecas pri kontakto kun la legantoj. Nia estimata 86-jara samideano Ivan Ko laboris multajn jarojn sur tiu posteno, traktante ĉefe la leterojn de niaj legantoj. La laboro starigas ponton inter la legantoj kaj nia redakcio kaj multe helpas la redakcion

por plibonigi la revuon laŭ la proponoj de niaj legantoj.

Ĉiujare ni ricevas pli ol mil leterojn, en kiuj niaj legantoj montras siajn sugestojn kaj opiniojn pri la artikoloj, fotoj, lingvaĵo kaj E-movado. Ni ordigas tiujn opiniojn kaj prezentas ilin al la redaktoroj. En 1996 ni malfermis la rubrikon "Temo proponita de legantoj" por plenumi dezirojn de la legantoj.

Oktobre de 1995 nia brazila

samideano Georgo Otto Vaske leteris al ni kun deziro koni la staton de ĉinaj ŝuistoj. Por tio nia redaktoro Sun Aijun vizitis ne nur 4 ŝufabrikejojn en Pekino, sed ankaŭ grandan ŝufabrikejojn en Qingdao. Post tio ŝi verkis la artikolon "La dua familio de ŝuistoj". S-ro G. O. Vaske legis la artikolon kaj skribis al ni: "Dankon al vi, ke vi akceptis mian proponon." Li diris al ni ankaŭ:

"Eble tiu artikolo estas publikiginda en gazeto de nialanda regiono de ŝufarado."

De 1994 nia sekcio estis taskita ankaŭ per distribuo de la revuo "El Popola Ĉinio" kaj Esperantaj libroj. Krom tio ni devas plenumi ankaŭ alian servadon al la legantoj. Foje litova leganto demandis en sia letero, kiel kuraci parkinsonismon. Por informiĝi pri la kuracmetodoj kaj kurackosto, ni vizitis 3 grandajn hospitalojn en Pekino.

Nun nia revuo estas distribuata en 74 landoj kaj regionoj. Tio signifas, ke niaj amikoj troviĝas en la tuta mondo. En la pasintaj 50 jaroj la legantoj multe kortuŝis nin per sia sincereco. Pluraj el niaj perantoj energie propagandis por nia revuo kaj eĉ dum sia vojaĝo kunportis abonilojn. Inter niaj legantoj ne mankas dumvivaj abonantoj. Nia germana leganto Josef Kondor neniam ĉesigis sian abonon de la revuo dum dekoj da jaroj. Nun li suferas de okulmalsano, tamen li ankoraŭ abonas la revuon. Multaj el niaj legantoj laŭdis nian laboron kaj sincere kaj senkaŝe montris niajn fuŝojn. Ĉio ĉi tio profunde kortuŝis nin kaj kuraĝigis nin por pli bona laboro. Mi pensas, ke ni devas atribui niajn sukcesojn antaŭ ĉio al niaj legantoj, al ilia granda helpo al ni kaj fervoro por E-movado. ■



Laborantino de la koresponda kaj distribua sekcio legas leterojn de niaj legantoj.

* La aŭtoro longe laboris en la koresponda kaj distribua sekcio de "El Popola Ĉinio" kaj emeritiĝis antaŭ nelonge.

Amo al Esperanto

En la unua tago, kiam ni eklaboris por EPĈ, ni estis nedisigeble kunligitaj kun Esperanto. Krom labori por la revuo, ni ankaŭ helpas ĈEL kaj ĈEE...

de WANG LIHUA

EN 1982, mi kaj miaj tri kunlernantoj, diplomiĝintaj el la fakultato de la franca lingvo de la Pekina Lingva Instituto, eklaboris en la redakcio de EPĈ, post unujara lernado de Esperanto. Siatempe, laboris por EPĈ dekkelkaj e-istoj ĉ.-40-jaraj, kiuj plejparte lernis Esperanton dum unu jaro kaj duono, diplomiĝinte el la fremdlingva fakultato de altlernejoj meze de la 60-aj jaroj.

Ĝenerale, la artikoloj de nia revuo devas esti traktitaj per lingva polurado, tajpado, reviziado, tralegado kaj aliaj 5 procedoj. En la tiama redakcio mi kaj miaj kunlernantoj estis la plej junaj, do ni komencis la laboron per tajpado kaj reviziado. Tiam, ni, e-istoj de la redakcio, havis ĉiu tajpilon, kaj ĉiutage, je la 8-a, eksonis en la oficejo de dekkelke da personoj "simfonio" ludata per tajpiloj. Post kiam niaj artikoloj estis kompostitaj en la presejo, ni devis reĝustigi la galeprovaĵojn. Ĉiumonate ni iris regule al la presejo por korektado, kaj poste du el ni restis tie por labori kune kun kompostistoj ĝis kiam aperis la lastaj provaĵoj.

En tiu periodo ĉiuj miaj kolegoj tiel ripetis la laboron monotonan kaj probable gravan. Ili silente dediĉis sian junecon kaj eĉ la tutan vivon al EPĈ. Por ke la revuo povu akurate atingi la legantojn, ili ĉiam laboris

silente, energie.

Krom tio ni helpas al la Ĉina E-Ligo (ĈEL) fari multajn laborojn, esperantigas ĉinajn librojn por la Ĉina E-Eldonejo, okazigas E-aktivadojn k.a. Inter ni ne mankas elstaraj e-istoj, kiuj estas plej okupitaj: S-ino Tan Xiuzhu, antaŭa vicĉefredaktoro de EPĈ, laboras ankaŭ kiel prezidanto de ĈEL kaj komitatano de UEA. Nia juna ĉef-



La aŭtoro (la dua de maldekstre en la antaŭa vico) kaj ŝiaj kolegoj en 1985

redaktoro-asistanto Yu Tao estas ĝenerala sekretario de ĈEL, prezidanto de la Ĉina Junulara E-Asocio, komitatano de UEA kaj membro de KAEM. Ili kontribuas ne nur por EPĈ, sed ankaŭ por la ĉina E-movado kaj eĉ por la internacia.

Ekde la 80-aj jaroj la redakcio sendas ĉiujare 1-2 personojn al UK, tio ege tiklas niajn kamaradojn. Kvankam oni devas plenumi penigajn taskojn en UK: fari raporton pri la kongreso, intervjuon kun gravaj personoj en Esperantujo, fotojn pri ĉiuj temoj, abonigi EPĈ, kontaktiĝi

kun EPĈ-perantoj kaj -legantoj ktp. Ĝojindas, ke pere de UK iuj junaj e-istoj firmigis sian volon por nia lingvo kaj volonte klopodas por E-aferoj.

La reformado kaj pordomalfermo leviĝis tra Ĉinio. La merkata ekonomio influas ankaŭ la redakcion de EPĈ. Kvankam en la 80-90-aj jaroj venis en la redakcion du grupoj da junuloj diplomiĝintaj el universitatoj, tamen pro ia kaŭzo iuj el ili, inkl. de miaj du kunlernantoj, sinsekve forlasis la redakcion.

Kun tempopaso, la situacio ŝanĝiĝis. En la 90-aj jaroj laborkondiĉoj de la redakcio de EPĈ multe pliboniĝis. Nun oni ne plu laboras dekope en unu ĉambro, sed nur 2-3-ope. La malnovaj tajpiloj estis metitaj flanken antaŭlonge kiel historiaj restaĵoj, kaj eĉ iliaj anstataŭantoj — komputiloj ja plurfoje renoviĝis. La e-istoj, kiuj laboris por EPĈ en la 90-aj jaroj, ne plu bezonis iri al presejo, ĉar la redakcio havas siajn proprajn komputilojn por kompostado kaj koncernajn specialistojn.

Kvankam ni malofte havas ŝancon partopreni E-aktivadojn eksterlande, tamen e-istoj el diversaj landoj gastas de tempo al tempo en nia redakcio. Tio vigligas ankaŭ nian laboron.

La amo kaj subteno de niaj legantoj al EPĈ kuraĝigas nin energie labori.

Menciindas, ke tiuj, kiuj eklaboris por EPĈ en la 60-aj jaroj, estas grava forto de la redakcio dum multaj jaroj: ili ne nur faras ĉiun laboron supren menciitan, sed ankaŭ ludas la rolon de E-instruisto por junaj EPĈ-anoj. En la 90-aj jaroj iuj el ili jam emeritiĝis kaj post nelonge ankaŭ la aliaj emeritiĝos. Tamen, ili ĉiam energie laboras kaj ilia pasio al la laboro por EPĈ estas tiel arda kiel antaŭe. Ili ofte diris: "Ni faras ĉion por niaj legantoj." ■

Pere de la okuloj de niaj raportistoj

Ni esperas, ke pere de la okuloj de niaj raportistoj, EPĈ pli konkrete konigos vivoplenan Ĉinion al la legantoj

de WANG HANPING

KIEL sia nomo, "El Popola Ĉinio" klare difinis jam ĉe la unua numero sian taskon, t.e. raporti pri Ĉinio hieraŭ kaj hodiaŭ. Por plejparto de niaj legantoj, Ĉinio estis antikva kaj mistera. En la unuaj 50-aj jaroj informoj el Ĉinio komuniĝis multe malpli glate ol hodiaŭ kaŭze de la politiko kaj tekniko. EPĈ funkciis kiel unu el la malmultaj ĉinaj legaĵoj, pere de kiuj alilandanoj povis informiĝi pri Ĉinio, kiel ponto kaj ligilo inter e-istoj ĉinaj kaj alilandaj.

Ĉinio posedas vastan teritorion kaj longan historion. Kiel konigi ĝin ĉiuflanke al la legantoj? Tio estis malfacila por la tiama redakcio de EPĈ konsistanta el 5 personoj. Pro tio EPĈ havis malmulte da fotoj kaj ĝiaj artikoloj plejparte estis kompilitaj. Meze de la 60-aj jaroj, por plibonigi EPĈ-laboron kaj disvolvi E-aferon la redakcio de EPĈ varbis novajn anojn kaj komencis labordividon laŭ fakoj: iuj sin okupis pri intervjuo kaj aliaj — pri fotado. La revuo aperis denove ĉiumonate. En la 80-aj jaroj pli ol 20 raportistoj kaj redaktoroj laboris por EPĈ. Ili intervjuis en diversaj lokoj de Ĉinio kaj eĉ landlimaj regionoj de nacimalplimultoj. Dank' al ilia klopodo, EPĈ liveris al siaj legantoj jenajn rubrikojn: "Malfermitaj urboj", "Vojaĝo laŭ Yangzi-rivero", "El reala vivo de Ĉinio", "Vivo de ordinaraj ĉinoj", "Multnacia Ĉinio" k.a.



La aŭtoro kun nacimalplimultanoj (la kvina de dekstre)

Ni esperas, ke pere de la okuloj de niaj raportistoj, EPĈ pli konkrete konigos vivoplenan Ĉinion al la legantoj. Por raporti kaj foti pri naciaj moroj kaj lokaj gustoj, niaj raportistoj iris al malproksimaj lokoj kaj ofte vojaĝis en ĉinaj tradiciaj festoj. Siatempe, s-ino Zhang Meizhi, nuna vicĉefredaktoro de EPĈ, ofte konfidis sian filineton al alia kaj vojaĝis longtempe por intervjuado. En pli ol 10 jaroj ŝiaj spuroj estis postlasitaj en diversaj lokoj de Ĉinio. S-ro Liu Sigong, nia fotisto, 3-foje vojaĝis al Xinjiang kaj 4-foje al Yunnan por foti la vivon de nacimalplimultanoj. En la pasintaj du jaroj, niaj raportistoj vizitis Tibeton kaj Makaon.

En la lastaj jaroj, influate de la ŝanĝiĝo de socia ekonomia strukturo, la nombro de niaj raportistoj malmultiĝis, tio ege pezis la laboron de la restantaj personoj. Ekz., s-ro Zheng Zhenjie sin okupas pri raportoj ne nur pri ekonomio kaj socia

vivo, sed ankaŭ pri nacioj, kuracado kaj sanprotektado; s-ino Pang Naiying — ne nur pri kulturo kaj edukado, sed ankaŭ pri medi-protektado kaj turismo; s-ino Xiang Hong — ne nur pri virinoj kaj infanoj, scienco kaj tekniko, sed ankaŭ pri arkeologio, sporto kaj aliaj; s-roj Li Chungeng, Zhao Xi kaj Li Yuwei respondecas pri fotado kaj foto-elektado. Kutime, ili ĉiuj devas unue elmeti sian raportan planon por ĉiuj numeroj de la tuta jaro, poste diskuti pri la praktikebleco kaj fine plenumi ilin unu post alia.

Pro manko de manoj, nun pliiĝis en la revuo artikoloj kompilitaj kaj skribitaj de aliaj laŭ peto de EPĈ-redaktoroj. Tamen la redakcio ankoraŭ lanĉis novajn rubrikojn, kiaj "Laŭ antikva vojo al Tibeto", "Laŭ la Silka Vojo" kaj aliajn rubrikojn ŝatatajn de legantoj. En 1989-1990, la redakcio petis raportiston ekster EPĈ por intervjuo kaj lanĉis la rubrikon "Laŭ la suda

Silka Vojo". Post tio ni entreprenis la rubrikon "Laŭ la Silka Vojo". Ekde 1995, la redakcio sinsekve sendis 5 grupojn ĉiu el unu raportisto kaj unu fotisto al la Silka Vojo. Dum 3 jaroj, ili transiris altajn montojn, trapasis vastajn stepojn kaj sovaĝajn dezertojn, spertis sennombrajn malfacilojn kaj finfine plenumis la raporto-serion por 32 numeroj de EPĈ, montris al la legantoj la Silkan Vojon hieraŭ kaj hodiaŭ kun historia kulturo kaj reala vivo. Pro manko de manoj kaj mono, la redakcio ne povas ofte okazigi tiom grandan intervjuon kaj raporton, tamen ni lanĉos malgrandajn raporto-seriojn, kia "Serĉo de Shangrila".

Hodiaŭ, alilandanoj povas koni malfermitan Ĉinion tra diversaj kanaloj. Ni ofte pripensis kiel liveri al la legantoj pli multe da legindaĵoj en nia revuo el limigitaj paĝoj. Per diversaj rimedoj kaj kanaloj ni sciis, ke multaj legantoj interesiĝas pri ĉinaj kulturo, historio, vivo, Tibeto, Hongkong kaj aliaj temoj,

do, en la lastaj jaroj ni igis la revuon distingiĝa per karakteroj kultura, socia kaj Esperanta kun pli multe da fotoj kaj mallongaj artikoloj. En la komenco de 2000 ni prove lanĉis en ĉiu numero unu temon detale eksplikitan. Krome, por plenumi la deziron de la legantoj, ni lanĉis la rubrikon "Temo proponita de legantoj", en kiu ni respondas iujn komunajn demandojn el la leteroj de niaj legantoj.

Kompare kun la kolegoj de alilingvaj revuoj, niaj raportistoj eble estas pli penemaj sed malpli salajrataj, tamen ili ĉiuj havas profundan amon al Esperanto kaj volonte laboras kun plena energio por E-afero. Niaj raportistoj tre ĝojis ĉiam, kiam alilandaj estoj gastis en la redakcio, kaj ĉiam, kiam la redakcio ricevis leteron de niaj legantoj. Fari EPĈ fenestro, tra kiu la legantoj povas koni Ĉinion kaj per kiu ni montras la ĉarmon de Esperanto al la ekstera mondo — jen la deziro de ĉiuj niaj raportistoj kaj la celo, al kiu ili strebas senĉese. ■

Tarifo: Du internaciaj respondokuponoj por kvin vortoj aŭ mallongigoj. Esp-organizo kaj niaj perantoj ĝuas 50% da rabato. La redakcio ne respondecas pri la enhavo de la anoncetoj nek pri la plenumado de la promesoj faritaj en ili.

★ S-ro Olaf Seek, 40-j. faklaboristo pri konstruado, ŝatas diskuti pri ĝeneralaj kaj interesaj temoj laŭ interkonsento. Adr.: A. Milarch-Str.16, DE - 17033 - Neubrandenburg, Germanio.

★ Jerzy Dembicki, 68-j. sperta esperantisto, dez. kor. pri diversaj temoj. Adr.: Daszynskiego 1/34, 33-300 Nowy Sacz, Pollando.

★ Esperanto Rondo bezonas diversajn materialojn: libroj, gazetoj, broŝuroj ktp. Ĉiuj donacantoj ricevos dankrespondon sur kolora E-bildkarto. Sendu al: Esperanto-Rondo de PEA, str. Mazowiecka 23, 82-200 Malbork, Pollando.

Kontribuaĵoj petataj por la konkurso "50 jaroj por EPĈ"

50 jaroj por

Esperanto

Paco

Ĉinio

En majo 2000 la redakcio de "El Popola Ĉinio" festos sian 50-jaran jubileon. En duonjarcento la revuo EPĈ, la E-movado en Ĉinio kaj la tuta mondo spertis grandajn ŝanĝiĝojn. Vi, spertanto de la 50 jaroj, certe havas ion por verki, por diri al la aliaj. Pro tio ni lanĉos konkurson "50 jaroj por EPĈ" kaj sincere petas vian kontribuaĵon.

Vi povas verki kun tre ampleksa temo, rilate al EPĈ — Esperanto, Paco kaj Ĉinio. Ekz. viaj esperantista sperto, opinio pri E-movado kaj paco, amikaj kontaktoj kun alilandanoj, impresoj pri kaj rilato kun Ĉinio kaj la revuo EPĈ...

Viaj kontribuaĵoj povas esti en ajna stilo kaj ajna formo. Estas tre bonvenaj koncernaj

fotoj kaj portreto de la aŭtoro por ilustrati la artikolon.

La kontribuaĵoj venu al nia redakcio antaŭ la 30-a de aprilo 2000.

Ni aljuĝos premiojn al la kontribuintoj. La premiitoj ricevos ĉinajn metiartaĵojn, E-librojn kaj unu-jaran abonon de EPĈ. Ĉiu kontribuinto ricevos donaceton.

Ni publikigos elstarajn kontribuaĵojn en la rubriko "50 jaroj — EPĈ". La rezulto de la konkurso leĝeblos en la julia numero de EPĈ 2000. Dum la 85-a UK en Tel Aviv de Israelo ni anoncos la rezulton kaj disdonos la premiitojn.

La Red.

"El Popola Ĉinio" kaj E-movado


De la komenco la revuo estis strikte ligita kun la idealo de Esperanto kaj E-movado de Ĉinio

de HOU ZHIPING*

PLEJPARTO de mia vivo estis pasigita en laboro por EPĈ, de 1963 ĝis 1998, kiam mi emeritiĝis. Dum longa tempo mi laboris kiel redaktisto kaj havis la ŝancon esplori E-movadon de Ĉinio. En ĉi tiu artikolo mi volontus konigi la interrilatojn de EPĈ kun E-movado. Espereble la temo interesos niajn legantojn.

En la 20-30-aj jaroj de la pasinta jarcento, ĉinaj esperantistoj batalis por la naciliberiga afero per nia lingvo kaj altiris al si pli kaj pli multe da samideanoj por kune rezisti kontraŭ la japana agreso. Ili eldonis gazetojn por diskonigi al la tuta mondo la batalon de la ĉina popolo kontraŭ la agreso de la japanaj militaristoj kaj gajni simpatian kaj subtenon de la progresema forto. Ili deklariĝis en Esperanto por varbi pli da samideanoj al la rezisto kontraŭ la agreso. Tiam en Ĉinio oni eldonis Esperantajn gazetojn "Heroldo de Ĉinio", "Voĉoj el Oriento", "Ĉinio Hurlas" k.a. Junuloj amantaj literaturon publikigis en la revuoj esperantigitajn novelojn kun la temo pri kontraŭagresa batalo. E-movado aliĝis al la torento de la naciliberiga movado de Ĉinio kaj ankaŭ al tiu de la kontraŭfaŝisma batalo de la mondo. Multaj patriotaj gejunuloj esperantistiĝis en tiaj cirkonstancoj.

Post la fondiĝo de la nova



La aŭtoro, Chen Yuan kaj Zhang Qicheng (de dekstre)

Ĉinio la mondo turnis sian atenton al la estonteco kaj sorto de la nova Ĉinio. Ĉinaj esperantistoj bone konsciis sian devon kaj proponis fondi Esperantan periodaĵon por faciligi al la fremdlandaj esperantistoj koni la novan Ĉinion, plifirmigi la amikecon inter la ĉina kaj alilandaj popoloj kaj fari kontribuon al la mondpaco kaj homa progreso, kaj samtempe diskonigi Esperanton. La propono estis baldaŭ aprobita de la registaro. En la 1-a de majo antaŭ 50 jaroj la unua numero de "El Popola Ĉinio" estis omaĝita al la legantoj. De la komenco la revuo estis strikte ligita kun la idealo de Esperanto kaj E-movado de Ĉinio. La apero de la revuo estis la konsekvenca rezulto de la progreso de la ĉina E-movado.

La revuo fariĝis marko kaj konsistiga parto de E-movado de



Ĉinio.

Ĉu Esperanto, artefarita lingvo kreita surbaze de la eŭropaj lingvoj, povos esti facile posedata de ĉinoj en Oriento por konigi pri la aferoj de Ĉinio kaj profundigi la komprenon de la mondaj esperantistoj pri Ĉinio? Ĉinaj esperantistoj frontis al nova tasko en la nova situacio.

Nun la praktiko de EPC en la pasintaj 50 jaroj elokvente pruvis tiun eblecon. En nia mano estas jam la 500-a numero de la revuo. Tiuj 500 numeroj amplekse konigis Ĉinion en diversaj temoj. En la rubrikoj "5 000 Jaroj de Ĉinio", "Laŭ la Silka Vojo", "Ĉina Kulturo" kaj "Ĉina Literaturo" ni konigis la antikvan historion kaj kulturon de Ĉinio. La rubrikoj "Multnacia Ĉinio" kaj "Vestoj de Ĉinaj Nacioj" rakontas la historion de ĉinaj naci-malplimulto kaj iliajn morojn kaj ĝenrojn. "Mia Vivo" konigas la vivon de ordinaraj ĉinoj de diversaj flankoj de la socio. "Ekonomie" prezentas la disvolvigon kaj progreson de Ĉinio en ekonomio, sciencoj kaj teknologioj. Ĉio tio pruvas, ke ĉinoj povas posedi Esperanton same kiel alinaciajn lingvojn por internacia komunikado. Tio estas tre signifa por E-movado.

Aliflanke, prezentante la novan Ĉinion al la eksterlando, EPC fariĝis ankaŭ fenestro por la eksterlando en konado pri Ĉinio. S-ro Simo Milojevic, eksa ĝenerala direktoro de UEA, kaj s-ro Osmo Buller, eksa direktoro de la Centra Oficejo de UEA, skribis al EPC: "...Por miloj da esperantistoj ĝi estis kaj daŭre estas fenestro, donanta rektan rigardon en vian landon, kiu havas tiel riĉan pasintecon kaj kiu nun vere laboregas super modernigo kaj ĉiuflanka plibonigo de la vivo de sia popolo. Via lando, kiu por multaj estis malproksima kaj fremda, dank' al via revuo fariĝis proksima kaj pli konata..." Iliaj afablaj vortoj multe kuraĝigis la laborantojn de EPC kaj instigis ilin al pli pena laboro.

La lingvaĵoj kaj esprimmanieroj de EPC estis akceptitaj de la legantoj. Okaze de la 45-jariĝo de EPC profesoro Lee Chong-Yeong, eksprezidanto de UEA, skribis en sia salutletero: "'El Popola Ĉinio' eble ne estas la plej malnova Esperanta periodaĵo, sed certe ĝi estas la plej luksa, plej ampleksa kaj plej enhavriĉa revuo en la mondo. La revuo montras al la mondo ke Esperanto estas praktika kaj viva lingvo." S-ino Spomenka

Ŝtimec, kroatia verkistino kaj iama estrarano de UEA, skribis pri EPC: "Via revuo multe kontribuis al la internacia Esperanto-movado, sed ĝi ne estas nur ĉina revuo. Ĝi helpas al ĉiuj legantoj senti apartenon al la internacia Esperanto-komunumo. Imagu la sperton, kiam mi renkontas iun nekonatan vojaĝanton en aŭtobuso, kiu foliumas 'El Popola Ĉinio'. Mi sentas ne ke li legas ĉinan revuon, sed ke li rilatas al la aferoj al kiuj ankaŭ mi apartenas. ...Ĉiumonate vi alportas al ni peceton da Ĉinio kaj peceton de nia propra Esperanto-kulturo. Vi helpis al ni mem ĝoji pri riĉo de Esperanto renkontante vian lingvaĵon."

EPC legiĝis kaj legiĝas sume en 156 landoj kaj regionoj. Multaj faktoj atestas, ke E-movado estas utila por la mondpaco kaj la progressa afero de la homaro, kaj konsekvence la movado rikoltos simpatian kaj subtenon de pli kaj pli multaj homoj. Multaj el niaj legantoj prenis EPC kiel instrumenton por konigi Esperanton al neesperantistoj. S-ro Ludoviko Enizan, nia franca leganto dum multaj jaroj, skribis al la redakcio, ke li diskonigadas Esperanton kaj Ĉinion per EPC. Kiam oni diris, ke Esperanto estas

Junaj EPC-anoj lernantaj en E-kurso por altlernejaj instruistoj en 1982





En renkontiĝo de ĉinaj kaj japanaj e-istoj

eŭropa lingvo kaj ne taŭgas al aliaj landoj, li nenion diris kaj nur montris EPĈ, kaj la dubintoj jam estis konvinkitaj. Hungara samideano Szentjorgyi Zoltan skribis en sia letero: "...Estas mia propra sperto, ke EPĈ per siaj ĝenerale kompreneblaj, klaraj priskriboj kaj artikoloj en la granda mezuro servas la amuzan praktikon, amigon kaj rekonon de la Esperanta lingvo en la tuta mondo."

EPĈ pretigis spacon por diverslandaj esperantistoj en ilia esplorado pri E-movado. Tiucele ni starigis la rubrikojn "Voĉo de Esperantistoj", "Libera Forumo de Eminentaj E-istoj" k.s. Al la rubrikoj kontribuis s-roj Humphrey Tonkin, Ivo Lapenna, William Auld, G. Waringhien, Tibor Sekelj, Ulrich Lins, Baldur Ragnarsson, Haszpra Otto, M. T. Popov, Hujucz, Bakin, Ye Junjian (Chun-Chan Yeh), Chen Yuan k.a. Iliaj artikoloj estas tre utilaj por la esperantistoj en ilia altigo de teoria nivelo, plivastigo de vidkampo, interŝanĝo kaj

elĉerpo de sperto kaj antaŭenpuŝo de la movado.

"Esp-novaĵoj" kaj similaj Esperantaj rubrikoj donas informojn pri E-movado de Ĉinio kaj aliaj landoj. Tiuj informoj montris la marŝon de E-movado kaj kuraĝigis la samideanojn. La manko estas, ke la informoj estas iom malfruaj kaj tro detalaj. Nun reto liveras pli da informoj, kio ebligas al ni plibonigi la laboron por tiuj rubrikoj. "Korespondi Deziras" okupas malgrandan spacon, sed ĝi estas tre bona ponto inter la esperantistoj de diversaj landoj, ebligante al ili akiri samideanojn de aliaj landoj. Korespondo altigis ilian lingvonivelon, firmigis la amikecon kaj iuj geedziĝis. "Sur Nia Librobreto" prezentas novajn eldonaĵojn, kiuj vigligis nian movadon. "Originale Verkitaj" donas ŝancon al literaturaj amantoj montri sian verkon. Per siaj poemoj, eseoj kaj noveloj ili flegas la Esperantan literaturan ĝardenon. "Por Komencantoj" estas vere por komencantoj, ke

ili tre ŝatas la artikolojn de la rubriko, kaj kursgvidantoj ofte prenas artikolojn de la rubriko aŭ aliajn artikolojn kiel instrumaterialojn. Ili skribis al ni, ke oni akiras sciojn pri Ĉinio kaj altigas sian lingvonivelon en legado de la artikoloj de EPĈ. Multaj el la lernantoj fariĝis niaj fidelaj legantoj.

Menciinde estas, ke ĉiujare la redakcio de EPĈ sendas siajn membrojn al UK. Iliaj raportaĵoj kaj fotoj trovis ŝaton de la legantoj, kiuj ne povis ĉeesti la kongreson.

Retrorigardante la pasintecon, ni bone konscias, ke ni bezonas pli da penado por plibonigi nian revuon. Ĉar nia laboro servas al la tuta E-movado, ni devas pli pene labori por perfektigi la revuon kaj ne vanigi la esperon de la tuta esperantistaro. ■

* La aŭtoro estas eksa direktoro de EPĈ kaj membro de la Konstanta Komitato de ĈEL.



Kun francaj e-istoj en la Somera Palaco



intervjuo
kun e-istoj
el Kroatio



Festkunveno por la 90-jariĝo de UEA



En la 5-a Pacifika Kongreso en 1992



En la Montpellier Kongreso en 1998

Unu jaro ĉe EPĈ

de GEOFFREY SUTTON*

KVINDEK-JARA datreveno de Esperanta gazeto ne estas ofta okazaĵo, kaj des pli tioma maturo gratulindas ĉe "El Popola Ĉinio" pro ĝia strebado al alta kvalito eĉ dum malfacilaj jaroj. Jam de sia komenco EPĈ ludas gravan rolon en la kulturo de la Esperanto-movado, kiu dum sia historio ĝuis malmultajn konstantaĵojn. Prave fieras pri EPĈ ne nur la ĉinoj mem sed ankaŭ la tutmonda esperantistaro.

Estas malfacile imagi, ke mi estas la unusola eksterlandano, kiu laboris ĉe "El Popola Ĉinio". Ankoraŭ post mia laborjaro en Pekino, kiu komenciĝis en oktobro 1981, mi imagis, ke iam venos sekvanto.

Mi neniam antaŭe estis en Azio, do la ŝanco vivi kaj labori en Ĉinio estis signifa aventuro. Dezirante sperti ankoraŭ pli survoje, mi flugis unue al Honkongo. De tie mi trajnveturis du tagojn al Pekino, pere de Kantono. Tion mi deziris pro du kialoj. Unue, mi deziris rigardi kiel eble plej grandan parton de Ĉinio, de la sudo ĝis la nordo, el la vitroj de la vagono. Due, mi deziris vidi, kie mia avo vivis kaj laboris en Kantono, ĉar jam tri pli fruaj generacioj de mia familio spertis en Ĉinio:

mia praavo, apotekisto, estis ente-rigita en Honkongo en 1913, kaj la avo okupiĝis pri la silkoindustrio en Kantono ĝis la 1920-aj jaroj, kie naskiĝis mia patro.

Oni renkontis min en la Pekina Stacidomo kaj de tiam mi parolis preskaŭ nur Esperanton dum la tuta jaro. Mi elkovris, ke la oficejo de "El Popola Ĉinio" troviĝas en la granda kortegohava domaro de la Fremdlingva Eldonejo, ekster kies pordoj dise moviĝis vigla bazararo sur polva strato borderita per arboj. La Esperanta estas unu fako inter la multaj, kiuj tie eldonas pres-aĵojn en diversaj eksterlandaj lingvoj, kaj mi baldaŭ komprenis, ke tiutempe daŭre

kreskis intereso por lerni eksterlandajn lingvojn, kiu favoris ne sole Esperanton.

Oni gvidis min al la fora flanko de la kortego, kie troviĝis unuĉambra loĝejo, mia por la venontaj dek du monatoj — nemalgranda, centre varmigita, kun por mi iom primitiva lavejo apude, uzata ankaŭ de najbara familio ĉina. Oni aparte por mi instalas eĉ telefonon, kion mi rapide komprenis esti multekostaĵo. Ekster la fenestro videblis apuda fabriko, kiu regule ĉiumatene enkonsciigis sian troviĝon, kiam laboristoj ariĝis por gimnastiki laŭ muzike akompanitaj instigoj el laŭparolilo — ja nun mi estis en Azio!

Mi laboris en ĉambro kun tri aliaj laborantoj, tuj apud la granda de la multaj tradukistoj. Mi funkciis plejparte kvazaŭ kromredaktisto, kontrolante la tekstojn de la kampare ofte jam multe pli spertaj tradukistoj, provante trovi ĉiam pli taŭgajn esprimojn. Oni cetere petis mian opinion pri diversaj aspektoj de la gazeto, kaj de tempo al tempo mi gvidis diskutadon kun la tradukistoj, dum kiu ni traktis la tradukojn el la antaŭaj monatoj. Aliflanke de la kortego troviĝis la malgranda oficejo de Ĉina Esperanto-Ligo,

La aŭtoro kaj EPĈ-anoj





La aŭtoro kaj pekinaj e-istoj

kiun mi foje vizitis, plej ofte por amikeca babilado aŭ diskutoj pri la movado. Mi kompreneble vizitis ankaŭ la Esperanto-fakon de Radio Pekino, kiu neeviteble aranĝis intervjui min.

De tempo al tempo la oficejo aranĝis ekskurson, plej ofte tuttagan, kiun partoprenis ankaŭ pluraj aliaj oficistoj de EPĈ. Per tio mi ĝoje konatiĝis kun la urbo kaj ĝia ĉirkaŭaĵo. Ne malofte venis alilandaj esperantistoj por viziti la redaktojn. Plej vive mi memoras la viziton de d-ro Ulrich Lins, sed ne sole pro tio ke mi nokte revenis tiel malfrue de lia hotelo, ke mi trovis min elŝlosita el la domo tiel ke mi devis vekti la kompatindan pordiston kaj klarigi kaj pardonpeti ĉinlingve.

Miajn du semajnojn da oficiala libertempo mi elektis pasigi ĉirkaŭ la urbo Xi'an por viziti la mondfaman subteran armeon el argilo de la unua imperiestro de Ĉinio. La bonaj

kontaktoj de EPĈ rezultigis, ke gvidis nin la ĉefarkeologo mem.

El tiu por mi eksterordinara jaro restas multaj diversaj memoroj — kiel ekzemple la nemankipovaj termosoj por la varma akvo, la multaj bicikloj sen noktaj lumoj, varmegaj sendormaj noktoj kuŝantaj sur pajla mato, la somera polvo de Pekino kaj nazkataro, ensezona manĝado de akvomelonoj kaj batatoj en la oficejo — sed plej elstaras la simpla amikeco. Aparte karaj al mi estis la gastamaj invitoj al manĝoj en hejmoj de la oficistoj. Tio estis por mi afero vaste aprezita, kaj mi ankoraŭ bedaŭras, ke tion mi ne povis facile reciproki.


De tempo al tempo okazis ankaŭ renkontiĝoj kun lokaj esperantistoj, kaj en la sama jaro komenciĝis la unua kurso de Esperanto por instruistoj. Kiam tiu klaso jam sufiĉe progresis, mi plurfoje renkontiĝis

kun ĝiaj anoj, foje por instrui pri fonetiko.



Memkompreneble la kompare malalta vivnivelo lasis ĉe mi daŭran impreson kiel ankaŭ la evidenta pliboniĝo de la ĝeneralaj kondiĉoj de la popolo. Sed ankoraŭ la kosto de poŝtmarkoj por sendaĵo al eksterlando restis signifa elspezo por ordinara ĉina esperantisto. Tio klare ekzemplis la gravajn malfacilaĵojn, kiuj malhelpis al la ĉinoj plenepeze ludi sian rolon en la tutmonda Esperanto-movado.

Bedaŭrinde mi ankoraŭ ne havis la okazon reviziti la ekskolegojn de EPĈ. Mi tamen fidis, ke tiu mia jaro en Ĉinio siamaniere utilis en la multflanka progreso ĉe la gazeto survoje al ĝia nuna respektata maturiĝo. ■


* Brita samideano, kiu laboris kiel volontulo por EPĈ unu jaron ekde oktobro 1981



Ni, gejunuloj de EPC-redakcio
 Hejmloko de ĉielaj gevaloj
 Anekdotoj pri boyoj
 Perspektivo al la nova
 internacia ĉiagva ordo



EL POPOLA
 ĈINIO



ĈINIO

● La 16-an de marto 2000 juna esperantisto Kaneko Yoichi el Japanio atingis Ŝanhajon. Vespere de la sekvanta tago li ĉeestis renkontiĝon de ŝanhajaj e-istoj en la hejmo de s-ro Ji Yingeng. En decembro 1999 Kaneko Yoichi komencis sian E-vojaĝon. Post vizito de 12 urboj de Koreio kaj 11 urboj de Ĉinio, li vojaĝos al Vjetnamio, Laoso, Kamboĝo, Tajlando, Pakistano kaj aliaj landoj. Laŭ la plano li revenos al Japanio en 2001. Esperantista renkontiĝo en la hejmo de s-ro Ji Yingeng okazas vespere de ĉiu dua vendredo. Estas bonvenaj e-istoj el ĉiuj landoj. Adr.: Ji Yingeng, Xinzha Road, Lane 57, No.8, CH-200003 Shanghai, Ĉinio

GERMANIO

● En la lasta 16-a Internacia Festivalo (IF) (27.12 1999 - 03.01 2000) en Munster, Germanio, kiun kiel kutime perfekte organizis



En la 16-a Internacia Festivalo en Munster, Germanio

samideano Hans Dietrich Platz, partoprenis infanoj kaj junuloj de Esperantaj familioj el la tuta mondo. La infanoj kaj junuloj ĝuis apartan prizorgon dum la tuta programo tage, paralela al la plenkreskula programo (plano). Al infanoj kaj junuloj kunhelpis spertaj esperantistoj-volontuloj el kelkaj landoj. Ili kune kantis kaj rigardis videobendojn kaj filmojn.

(Dieter U. Alicja Quednau)

VJETNAMIO



● Memore al la 140-a datreveno de la naskiĝo de Zamenhof, vjetnama e-isto Dang Dinh Dam okazigis en sia nova domo E-ekspozicion, kiun vizitis, krom 50 hanojaj e-istoj, ankaŭ e-istoj el Aŭstralio kaj Francio.

SVEDIO

● Tutsemestra kurso 28/8-20/12 2000. Kostoj: ĉ. SEK 14 000: studoj, loĝado, manĝado — sen semajnfinaĵoj. Nur studado: ĉ. SEK 900. Kostoj

por lernolibroj: ĉ. SEK 300. Eksterlandanoj rajtas partopreni parton de longa kurso kaj tiam pagi proporcie al studtempo. Nia lerneja ekzameno estas propedeŭtika al la Internacia Ekzameno. Nordaj studentoj ricevas monapogon ĉe Nordens Folkliga

Akademi, Box 120 24, 402 41 Goteborg, Svedio. Tel: 031 - 69 56 00 fakso: 031 - 69 09 50. Adreso: Esperanto-fako, Karlskoga Popola Altlernejo, 691 24 Karlskoga, Svedio. Telefono: 0586-64614, 64600; fakso: 0586-64622; reto: lars.forsman@fhsk. karlskoga.se.

● Somera kurso 16-28/7, 2000 — kunlabore kun la Esperanto-gastejo en Lesjofors. 85 km. norde

de Karlskoga. Petu specialan informon ĉe Esperanto-domo, Lesjofors, 680 96 Lesjofors, Svedio. Telefono: 0590 - 309 09, fakso: 0590 - 30309. (Esperanto Fako)

UZBEKISTANO

● Vin atendas la Azia Esperanto-Renkontiĝo "AERO - 2000", dediĉita al la Internacia Jaro de la Kulturo de

Paco kaj Senperforto, okazonta subaŭspicio de la Universala Esperanto-Asocio en la 2750-jara Samarkando, 15-20 aŭgusto 2000. Sojle de la nova miljaro AERO celas doni freŝan inspiran aeron al la azia esperantistaro kaj akceli E-movadon en la regiono. Fakte estas bonvenaj gastoj el ĉiuj kontinentoj. La programo: seminario pri E-movado en Centra Azio, sinprezento de aziaj E-kluboĵoj, instruista seminario, fakaj kunsidoj, intensaj E-kursoj por komencantoj kaj progresantoj, internacia arta vespero, 2-hora ekspresa kurso de la uzbeka lingvo, E-loterio, gustumado de famaj uzbekaj vinoj, pikniko en la montaro, vizitado (kun E-ĉiĉerono) de mondfamaj vidindaĵoj de la antikva Samarkando ktp. Laŭdezire aranĝeblos ankaŭ postaj ekskursoj al Buhhara, Taŝkento, Ŝahrisabz, Pengikent (Taĝikistano) ktp. Ĉefa organizanto: Internacia Muzeo de Paco kaj Solidaro, Samarkando. Partoprenkotizo: 195 USD inkluzivas loĝadon en 2-litaj hotelĉambroj (kun necesejo, duŝo kaj lavejo en ĉiu ĉambro), trifojan manĝadon tage, surlokan transportadon, ekskursojn, vizan subtenon kaj la tutan programon. Bonvolu kontak-tiĝi kun Internacia Muzeo de Paco kaj Solidaro, P.O. Box 76, UZ - 703000 Samarkando, Respubliko Uzbekistano. Telefono: +998 (662) 331753. Fakso: +998 (662) 310777 (por S-ro Ilhom H. Sadullaev). Reto: peacetur@samuni.silk.org (bv. ne sendi longajn retmesaĝojn!)

(Delta)

A black and white photograph of actress Gong Li. She is shown from the chest up, smiling warmly and looking towards a man whose back and shoulder are visible on the left. She has her hand resting on his shoulder. She is wearing a dark, textured, high-collared garment. The background is softly blurred, showing what appears to be a window with a lattice pattern.

Mondfama ĉina filmstelulino Gong Li

de XIANG HONG

En 1988 la filmo "Ruĝaj Sorgoj", kiun Zhang Yimou reĝisoris kaj en kiu Gong Li ludis la ĉefrolon, gajnis la premion "Ora Urso" en la 38-a Berlina Filmo-festivalo. Tiam Gong Li estis provludanta dramon en Ĉinio, kiel duaklasa studentino en la prezenta fakultato de la Centra Drama Instituto. Informiĝinte pri la novaĵo, ŝi eĉ ne sciis, kio estas la menciita premio. Tamen tio ne malhelpis ŝin tuj famiĝi. Kiel nova ĉefrolulino ŝi montriĝis sur la kovrilpaĝo de nia revuo, n-ro 7 de tiu jaro.

12 jaroj pasis, kaj nun Gong Li sendube montras sian internacian famecon dank' al tio, ke ŝi estis invitita kiel ĉefo de la juĝ-grupo de la 50-a Berlina Filmo-festivalo okazinta la 9-20-an de februaro ĉi-jare. Dum tiuj 12 jaroj ŝi akiris multajn brilajn sukcesojn kaj fariĝis mondfama filmstelulino, al kio sennombraj ĉinaj aktorinoj dumvive strebis kaj kion ili tamen ne atingis. Dum tiuj 12 jaroj, kvankam ŝi malofte akceptis intervjuon, tamen la publiko ĉiam atentis ĉion pri ŝi: ŝia prezentado en la de Zhang Yimou reĝisorita filmo "Qiuju Akuzas" gajnis al ŝi la titolon "Plej Bona Aktorino" de la Venecia Filmo-festivalo en 1993; ŝajne ŝia kunlaboro kun aliaj famaj reĝisoroj ne tiel sukcesis kiel tiu kun Zhang Yimou; kompreneble oni ankaŭ interesiĝis pri ŝia amhistorio kun Zhang Yimou, pri ŝia konatiĝo kun kaj edziniĝo al iu Hongkong-a riĉa komercisto... Ŝia plej nova rolo estas senlaboriĝinta patrino, kiu sola vivtenas la fileton surdmutan, en la filmo "Bela Patrino" reĝisorita de Sun Zhou. Elektita kiel konkursaĵo por la ĉi-jara premio "Ora Urso", la filmo amuze projekciĝis poste en Berlino pro ŝia ĉefeco en la juĝ-grupo. Kaj ŝi kontentas pri sia prezentado en la filmo. Ŝi diris, ke samkiel Zhang Yimou kaj Chen Kaige (reĝisoro de la filmo "La Lasta Vido" kun ŝi kiel ĉefrolulino), Sun Zhou bone konas ŝian ludmanieron, kio utilas por ŝia pli bona ludo.

La lastan septembron, la Kultura Ministerio de Francio donis al Gong Li Verdand Kruc-medalon. La okcidentaj amaskomunikiloj tiel laŭdis Gong Li, ke ŝi estas eksterordinara figuro, kiu perfekte kunfandis en si la talenton, saĝon kaj belecon, kaj estos vera sendito de la ĉina filma afero. Intervjuate, ŝi diris: "Mi tre ĝojas, ĉar tio estas konfirmo pri mia laboro. La honoro apartenas ne nur al mi, sed ankaŭ al la patrolando malantaŭ mi."



En la filmo "Vivanta" (1993)



En la filmo "Gluju Akuzas"



En la filmo "Red Pointo"





Sur reklamilo (1997)



Kiel Jugisto de la Internacia Filmo-festivalo en Cannes en 1997



Akceptanta la premion en la Internacia Filmo-festivalo en Cannes en 1994



Ugustanta premio al unua rolulo



Kun la amato Hsing Hsiang en la hejmo en 1998

Ĉi tie estas Wangfujing



Teksto de XIANG HONG
Fotoj de LIU SIGONG


Nemalproksime oriente de Tian'anmen-pordego, kun Chang'an-strato kruciĝas Wangfujing(Ŭangfuĝing)-strato.

La strato estas mallonga, 810-metra. Por trairi ĝin dekkelke da minutoj sufiĉas.

La strato estas longa. Ĝi, trapasante la tempan tunelon, atestas la 800-jaran historion de Pekino, kiu ĉefurbiĝis komence de Yuan-dinastio (1206-1368). En 1903, tie aperis la fama Dong'an-bazaro. Tio fundamentis la bazon por Wangfujing, ke ĝi ĝuis la renomon "La Unua Komerca Strato" de Pekino kaj eĉ de Ĉinio dum 100 jaroj. En ĉiu colo de ĝia tero kondensiĝas rakonto pri kapitalo. Ĉu kelke da minutoj estas sufiĉaj por koni la straton?

La strato estas malnova. En la unua etaĝo de la rekonstruita Nova Dong'an-bazaro funkcias pli ol 20 malnovaj butikoj, ĉiuj kun la historio de ĉ. 100 jaroj; ĉe la norda ekstremo de la strato estas sekiĝinta puto fosita antaŭ 500 jaroj; lasta printempe konstruistoj trovis malnovan brikon, sur kiu gravuriĝis kronologia titolo de Ming-dinastio (1368-1644)... Kiam vi ĝuas ŝafaĵon en la plej fama Donglaishun(Donglajŝun)-restoracio, aŭ vin vestas per ĉinstilaj vestoj aĉetitaj de Ruifuxiang(Jufuŝjang), la plej renoma malnova vendejo de silkaĵoj kaj vestoj, vi profunde perceptas antikvecon.


La strato estas nova. Pri ĝia kelka ŝanĝiĝo iuj el niaj



La ĉiovenda Wangfujing-magazeo prezentata en EPĈ, n-ro 3'1959

legantoj eble legis nian raportojn en la 3-a numero de 1959. Ekde 1992 oni konsumis pli ol 120 milionojn da usonaj dolaroj kaj 8 jarojn por renovigi Wangfujing laŭ internacia normo de komerca pasuma strato. La renovigita strato enkorpiĝis lertan kunfandiĝon de tradicio kaj moderneco, de pompeco kaj delikateco. Rilate impreson pri Wangfujing, eble trafa estas tia esprimo: Por alilandanoj, Wangfujing estas ĉina; por ĉinoj — antikva kaj moderna.





Wangfujing-strato
en nokto
Foto de DU ZEQUAN




En vesto-vendejo



Fasado de la Nova Dong'an-bazaro



Antaŭ la Ĉiovendejo de Pekino



Florbedo sur la strato

EI NIA FOTO-ALBUMO



S-roj Bakin, Ye Junjian kaj Li Naixi
(de maldekstre)




S-ro Zou Guoxiang

S-ro Wu Xunnan, eksa
direktoro de la
redakcio de EPĈ,
donanta ateston pri
eldonado de elstara E-
libro





S-ro Liu Ling laboras por la Ĉina E-Ligo post sia emeritiĝo.



S-ro Ivan Ko

S-ro Zhang Qicheng kaj lia edzino





Laŭlum, Chen Yuan kaj Zhang Qicheng (de dekstre)



S-ro Yang Rumo
(dekstre) kun
EPC-raportistino



S-ro Zhou
Dongyuan,
eksa direktoro
de la redakcio
de EPC



Bakin ĉiam zorgas pri EPĈ.



S-ino Zhang Zhongliu (la dua de dekstre en la unua viĉo),
eksa direktorino de EPĈ

Eterna memoro

Okaze de la 50-jariĝo de EPĈ mi per mia mallerta plumo prezentu iliajn farojn eĉ bagatelajn por esprimi mian karmemoron al ili

de TAN XIUZHU*

VENLO Fon, Tikos, Zensto kaj Honfan konatiĝis kiel meritplenaj pioniroj de la ĉina E-movado. Ili ankaŭ estis fruaj laborantoj de "El Popola Ĉinio" kaj oferis al ĝi sian grandan parton de la vivo. Estas feliĉe, ke de la komenco de mia esperantista kariero mi laboris kun ili kaj akiris iliajn instruojn, edifojn kaj helpojn. Mi havas profundan amon kaj korajn dankojn por ili.

MIAJ E-INSTRUISTOJ VENLO FON KAJ ZENSTO

Oktobre de 1964 mi komencis lerni nian lingvon en la Esperanta kurso en la Pekina Disaŭdiga Instituto. La kurson gvidis Venlo Fon kaj Zensto, kiuj kumule laboris tiam en la redakcio de EPĈ.

Ili ambaŭ estis tre kompetentaj instruistoj de Esperanto. Frue en la periodo de la ĉina Kontraŭjapana Rezistmilito, en tre malfacilaj kondiĉoj Venlo Fon fondis en ĉina urbo Chongqing la Korespondan Esperanto-Lernejon kaj elbakis multajn esperantistojn, inter kiuj estas samideano Laŭlum, eksa vicĉefredaktoro de EPĈ kaj membro de la Akademio de Esperanto. Venlo Fon kompilis "Plenan Vortaron Esperantan-Ĉinan" kaj lernolibron "Elementa Kurso de Esperanto", kiuj per sia precizeco, scienceco kaj praktikeco trovis vastan ŝaton de ĉinaj esperantistoj kaj fariĝis tre efikaj kaj multe uzataj lerniloj.

Eĉ nun mi bone memoras la unuan tagon kiam Venlo Fon venis instrui en la kurso. Li impresis nin kiel tipa ĉina intelektulo, mezastatura, grizhara, ĝentila, kun

dikaj okulvitroj. Antaŭ ol lernigi al ni Esperanton, li rakontis al ni pri ĝia historio, rolo kaj perspektivo. Je mencio de la idealo de D-ro Zamenhof, pro forta emocio, lia korpo pretervole saltetadis sur la seĝo kaj liaj dentaj protezoj en la buŝo komike kraketadis. Mi

bone memoras ankaŭ lian aspekton kiam li kantis al ni la himnon "La Espero": Kun serioza mieno li elstarigis la bruston, kuntiris la lipojn kaj tremetigis la kapon. Tiam mi forte kortuŝiĝis de ia sankta sento kaj solena etoso. En la lecionoj li ĉiam donis al ni afablan rideton, traktis nin ne rigore, eĉ parolis ne laŭte, tamen en lia senlaca kaj pacienca instruado ni vidis lian devkonscion al la lernantoj, kaj ni ne povus, aŭ nin ĝenus maldiligenti en la lernado.

Zensto lernis Esperanton en 1929. En sia unua duono de la vivo li migris en multaj lokoj en suda Ĉinio. Kien ajn li iris, li entuziasme fondis Esp-kurson por disvastigi nian lingvon, tial li estis honorita kiel "diligenta semanto" de Esperanto en Ĉinio.

Zensto vidigis sur si ne nur profundan scion pri la ĉina kulturo, sed ankaŭ influon de la okcidenta kulturo. Kompare kun Venlo Fon li ŝajnis pli vigla, liberspirita, facile alirebla kaj humura. En liaj lecionoj neniam mankis gajaj ridoj. Li enkondukis en sian instruadon la ĉiutagan vivon de ni studentoj kaj ankaŭ de li mem, ĉiamaniere igis la instruadon tre interesa kaj vigla. Li per diversaj metodoj kuraĝigis



La aŭtoro gratulanta la 90-jariĝon de Zensto en 1994

nin praktiki la lingvon. Eĉ nun mi ne povas min deteni de ridado kiam mi ekmemoris anekdotojn okazintajn siatempe en la lecionoj.

Dank' al ilia diligenta kulturado ni rapide progresis en la lernado, kaj post unu kaj duona jaroj ni eklaboris kiel profesiaj esperantistoj. Post diplomiĝo mi feliĉe laboris ĉe la du instruistoj. Krom siaj propraj laboroj de verkado, tradukado, korespondado ili ankaŭ devis poluri niajn tradukaĵojn aŭ artikolojn. Kiam ni, junaj kolegoj, babiladis en la redakcio en la ĉina lingvo, Zensto ĉiam atentigis nin afable kaj sincere: "Parolu Esperante!"

Post sia emeritiĝo Venlo Fon kaj Zensto daŭre zorgis pri la ĉinaj Esperantaj aferoj. Malgraŭ rompiĝo de la dekstra kruro Venlo Fon ofte lambastone iris al la oficejo por helpi la eldonadon de Esperantaj libroj kaj Zensto direktis sian entuziasmon al la loka E-movado.

En siaj lastaj jaroj Zensto ege malfortiĝis, ke estis malfacile por li vidi kaj skribi, sed li skribis al mi en Esperanto multajn leterojn kaj slipojn, en kiuj li rimarkigis mian malbonan elparolon, zorgis pri mia sano kaj humoro, kuraĝigis

min venki malfacilojn en la laboro, diskutis pri la lingvo-problemo en la gazeto, interŝanĝis kun mi opiniojn pri iuj demandoj kaj donis al mi proponojn kaj konsilojn. Li eĉ atentigis min: "Elstarigu vian bruston dum irado."

FORTA KAJ FEBLA TIKOS

Kiam mi unuafoje eniris en la redakcion de EPĈ, mi tuj estis altirita de la afabla vizaĝo de Tikos kaj lia bela barbo longe pendanta antaŭ la brusto.

La barbo de Tikos havis longan historion. Sur foto farita en la tridekaj jaroj mi vidis, ke sur ĝi Tikos jam havas barbon. Mi ne demandis kial li elkreskiĝas la barbon, sed mi propraokule vidis lian amzorgan flegon al ĝi. Li ofte vizitis barbirejon por ĝin purigi kaj beligi, kaj ĉiam kunportis kombileton por ĝin ordigi, aŭ ĝin karesis per la manoj. En ventaj tagoj li ameme metis la barbon sub la palton por ke la barbo ne taŭziĝu de la vento.

Tikos venis labori en la redakcio en 1958. Antaŭ tio li fervore agadis por E-movado en Wuhan kaj Ŝanhajo post sia esperantistiĝo en 1924. Li kaj aliaj fondis la Hankou-an Esperanto-Societon kaj reorganizis la Ŝanhajan Esperanto-Asocieton, eldonis Esperantajn periodaĵojn "La Lumo", "La Espero", "Orienta Kuriero", "Voĉoj el Oriento" kaj "Popola Mondo", kaj estis influa persono en la ĉina E-movado. En la redakcio de EPĈ li estris la tradukan fakon, ĉefredaktoris la Esperantan tradukon de "Elektitaj Verkoj de Lusin".

Kvankam Tikos ne instruis nin en la Esperanta kurso, tamen en la redakcio de EPĈ li elverŝis grandan energion por levi la lingvonivelon de ni, liaj junaj kolegoj. Post polurado al miaj tradukaĵoj aŭ artikoloj, li ĉiam detale klarigis al mi ĉiujn korektojn kaj montris al mi atentindaĵojn. Li opiniis, ke por rapide levi la lingvonivelon oni devas, krom multe sin ekzerci per tradukado

kaj verkado, ankaŭ multe legi Esperantajn librojn, precipe fremdlandajn klasikajojn. Li konigis al mi Esperantan bibliotekon de la redakcio kaj rekomendis al mi legindajn librojn. Li ankaŭ kuraĝigis min ĉinigi fremdlandajn Esperantajn librojn por diskonigi nian lingvon en Ĉinio. Li ordigis sian sperton de multjara tradukado kaj kolektis ilin en broŝuroj "Notoj pri Tradukado" kaj "Lernado kaj Progresigo", kiujn li mimeografis kaj disdonis al ni.

Tikos ne nur zorgis la progreson de siaj junaj kolegoj en la redakcio, sed ankaŭ donis eblan helpon al ĉiuj Esperanto-interesitoj en la socio. Per sia propra mono kaj malmulte da monhelpo li mimeografis 21 specojn da Esperantaj legaĵoj kaj lernomaterialoj kaj senpage sendis al la petantoj. En 1981 li iniciatis la Xinhua-an Esperantan Korespondan Lernejon, kiu varbis pli ol 50 mil lernantojn. Li mem funkciis kiel ĝia direktoro.

En 1978, la Ĉina Pupteatra Trupo partoprenis laŭinvite la 11-an Internacian Pupteatran Festivalon. La organizantoj postulis, ke oni prezentu en Esperanto. Pro tio mi estis sendita al la pupteatra trupo instrui Esperanton por tri monatoj. Tikos rigardis tion bona ŝanco por diskonigi nian lingvon enlande kaj internacie, tial li montris grandan entuziasmon por tio. Li donis al mi konsilojn en la

instruado kaj kune kun mi iris al la pupteatra trupo por rigardi ilian lernadon kaj provludon, kaj respondis iliajn diversajn demandojn. En tiu festivalo la Ĉina Pupteatra Trupo prezentis la ĉinan miton "Ribelo kontraŭ la Ĉiela Palaco". Ili ricevis fakan premion, la infanan premion kaj la oficialan apartan mencion pro granda laboro farita en tre mallonga tempo kaj la trian lingvan premion.

Tikos estis ne nur mia instruisto sed ankaŭ amiko. Ni povis nomi lin Fang (lia familia nomo) sen kutima epiteto por estimata maljunulo, eĉ Barbulo, senĝene ŝercis kun li kaj laŭte disputis kun li. En la sufokaj jaroj de la ĉina kultura revolucio mi povis elverŝi al li ĉion en mia koro kaj trovis ĉe li konsolon. Li zorgis pri mi kiel patro. Li donis al mi diversajn sciojn pri la ĉiutaga vivo. Vidante, ke mi estas tro malgrasa, li rekomendis al mi plurajn sanigajn metodojn kaj donacis al mi tonikon faritan el ĉinaj drogoj.

Tikos havis firman kredon al Esperanto kaj montris sin obstina kaj malcedema fortulo en la batalo por efektiviĝi ĝian idealon. Sed li estis ankaŭ febla. En siaj lastaj jaroj kiam lia solfilo, pro kiu li rifuzis reedziĝi post kiam li perdis la edzinon en sia aĝo de 50 jaroj, ne komprenis lian aferon, kaj eĉ malhelpis lin kontaktiĝi kun esperantistoj, li restis senpova, kaj



Honfan (dekstre), premiita de ĉina kultura ministerio pro la de li ĉefredaktoriĝinta "Esperanto-Ĉina Vortaro"

eĉ decidis forfuĝi el la hejmo. Konsiderante lian sanstaton mi kaj mia kolego Wang Shirong deadmonis lin, sed li insistis en sia ideo. En iu maja tago de 1981, sen sciigo al la filo, li, helpe de ni kolegoj, trajnveturis al Suzhou, kie estis liaj konataj kaj sinceraj samideanoj.

Tiam Tikos jam trafiĝis de hemiplegio pro hipertensio kaj lin flegis vartistino. Nelonge post tio Tikos revenis al Pekino pro nesolveblaj problemoj en la ĉiutaga vivo en la nova loko kaj graviĝo de la malsano. Kiel ajn oni juĝu lian tiun agon, ĝi estis tragedia epizodo en lia vivo. Tikos diris foje: "Esperanto estas ankoraŭ nova afero, neakceptebla tuj por la publiko. Ĉiu ĝia antaŭenpaŝo ne eblas sen pena batalo." Ĉu tion ne pruvis la malagrablaĵo inter li kaj lia filo?

PENSPROFUNDA ERUDICIULO HONFAN

En la redakcio de EPĈ mi kontaktiĝis kun Honfan ne tiel multe kaj intime kiel kun Venlo Fon, Zensto kaj Tikos. Eble pro lia seriozeco kaj rigoreco al siaj kolegoj iuj junuloj sentis timeton al li. Sed li same estis unu el miaj amataj kaj estimataj personoj.

Dum la Kontraŭjapana Rezistmilito, kiam Venlo Fon fondis en Chongqing la Korespondan Esperanto-Lernejon, Honfan ofte iris helpi lin, kaj poste li forlasis sian salajratan laboron kaj venis al la lernejo por okupi sin ekskluzive pri la Esperanta instruado. Post tio li ne plu funkciigis E-kursojn, nek multe montriĝis en esperantistaj renkontiĝoj, sed li per sia propra maniero faris neordinaran kontribuon al la ĉina E-movado.

Kiam "El Popola Ĉinio" fondiĝis en 1950, Honfan jam estis unu el ĝiaj tri profesiaj laborantoj. Li verkis, tradukis, tajpis, korespondadis, elsendadis gazetojn..., unuvorte, li faris ĉion necesan por la revuo. Fine de 1965, kiam mi venis en la redakcion, li

estis estro de la sekcio de la ĉina lingvo. Grandan impreson faris sur mi lia alta klereco pri la ĉina kaj fremdlanda kulturoj, riĉa sperto de redaktado, originalaj sugestoj kaj opinioj pri problemoj de politiko, ekonomio, socio kaj Esperanta studo. Li ĝuis respekton de la kolegoj.

Honfan estis tre serioza kaj ordema en la laboro kaj en la vivo. Lia tiu laborsinteno kaj karaktero tre utilis al lia kompilado de vortaro. Post la fino de la kultura revolucio en 1976 furoris en Ĉinio lernado de Esperanto. Laŭdire la nombro de la lernantoj atingis 400 mil. Sed ege mankis lerniloj. Tiam oni ĝenerale uzis "Plenan Vortaron Esperantan-Ĉinan" kompilitan de Venlo Fon en 1943 kaj "Novan Vortaron Esperantan-Ĉinan" kompilitan de la Ĉina Esperanto-Ligo en 1959. La du vortaroj ludis gravan rolon en la lernado de Esperanto por ĉinoj. Sed kun tempopaso ili ne povis kontentigi la bezonon. Printempe de 1979, en sia aĝo de 70 jaroj Honfan akceptis la proponon de s-ro Chen Yuan, tiama vicprezidanto de ĈEL, kompili novan kaj pli ampleksan vortaron ĉinan-Esperantan.

Kiel ĉiuj scias, kompilado de vortaro estas afero tre malfacila kaj peniga. Kiel ĉefredaktoro de tiu vortaro Honfan ne nur faris multe da organizaj laboroj, sed ankaŭ plenumis neimageble malfacilan laboron kaj montris mirindan persistecon de la planado kaj verkado de la vortaro ĝis kontrolado de ĉiuj ĝiaj artikoloj. En la komenco sole la diversaj



Hujucz kaj Tikos (maldekstre)

klarigoj kaj atentigoj pri aranĝo de la vortaro, kiujn li mem verkis, mimeografis kaj disdonis al ĉiuj kompilantoj, stakis dike. Pro la vortaro li ne ripozis en dimanĉo, nek en feriaj tagoj. Kiam ajn ni vizitis lin, ni ĉiam vidis lin labori super la vortaro. Tiam li suferis seriozan okulmalsanon kaj ankaŭ lia koro malbone funkciis. Por ke la vortaro kiel eble plej baldaŭ eldoniĝu, li difinis por si striktan planon, kaj por garantii la kvaliton de la vortaro li petis specialistojn revizii fakajn artikolojn.

Post 7-jara diligenta laborado tiu ĝis nun plej granda "Esperanto-Ĉina Vortaro" eldoniĝis en 1987. Tio estas granda afero de la ĉina E-movado kaj ankaŭ valora donaco de ĉinaj esperantistoj omaĝe al la centjariĝo de Esperanto. Hodiaŭ kiam ni uzas tiun vortaron, ni ne povas forgesi ĝian ĉefredaktoron Honfan.

* * * *

La kvar pioniroj oferis sian tutan varmon kaj lumon al EPĈ kaj la ĉina E-movado kaj forlasis nin unu post alia, sed postlasis al ni valoran spiritan riĉaĵon. Ilia spirito instigas nin diligente labori en nia verda ĝardeno kiel konsciaj kaj persistemaj kulturantoj. ■

* Tan Xiuzhu, eksa vicĉefredaktoro de EPĈ

Gastado ĉe esperantistoj eksterlande

En la hejmo de s-ro Andre ni tri havis po unu ĉambron, sed la gemastroj tranoktis en kanapo kaj seĝo. S-ro Andre kaj lia edzino Teresa ŝatis nomi sian hejmon "internacia familio", ĉar en ilia hejmo pasloĝis dekoj da esperantistoj de dekelkaj landoj inkluzive de ĉinaj samideanoj

de WANG SHIRONG

KIEL profesia esperantisto, mi laboris 35 jarojn en la redakcio de "El Popola Ĉinio". Mi kore amas Esperanton pro ĝia nobla idealo kaj oportuna praktikebleco en interkomunikado de la diverslandaj samideanoj en la pac-movado. Dank' al Esperanto mi akiris pli vastan vidkampon kaj ĝuas instruan korespondadon kun alilandaj samideanoj. En la lastaj 20 jaroj mi trifoje vojaĝis eksterlanden kaj havis multajn neforgeseblajn spertaĵojn, kiam mi pasloĝis ĉe la gastamaj samideanoj ekster Ĉinio. Pasloĝado donis al mi bonajn ŝancojn familiare interparoli kun ili kaj pli proksime koni ilian vivon kaj laboron, iliajn hobiajn, iliajn kulturon kaj vivmanierojn, iliajn opiniojn pri Ĉinio kaj diversaj aferoj de la mondo. La gastameco kaj sincereco de niaj gastigantoj gravuriĝis en mia kapo kaj ofte reaperas en mia memoro la belaj scenoj de la kunestado kun la amikoj.

Mi havis mian unuan eksterlandan pasloĝadon en la hejmo de s-ro Winn Zacherl, kanada esperantisto. Nun mi ankoraŭ klare memoras lian belan baritonan voĉon kaj la afablan rideton de lia edzino Marie.

En 1980, la Dua Pacifika Kongreso de Esperanto havis sian ejon en la Universitato de Brita Kolumbio en Vankuvero de Kanado. Mi estis unu el la tri delegitoj de la Ĉina Esperanto-



La aŭtoro (meze) en la hejmo de s-ro Durwael

Ligo. Tio estis mia unua eksterlanda vojaĝo, kaj ĉio dum la vojaĝo estis interesa kaj tiklis mian scivolemon. Vankuvero estas tre bela kaj iom simila al mia hejmurbo Ŝanhajo ĉe la okcidenta ekstremo de Pacifiko. Post la kongreso mi kaj miaj kolegoj partoprenis en sestaga tenduma ekskurso. Per aŭtobuso dekoj da kongresanoj veturis de loko al loko por havi pli longan kontaktadon de diverslandaj esperantistoj kaj ĝui la admirindan naturon de la provinco Brita Kolumbio. Nokte ni dormis en tendoj, kiujn la ŝoforo kaj ni kune starigis, kaj en la sekvanta mateno ni malmuntis la tendojn kaj litojn kaj metis ilin en grandajn kofruojn ambaŭflanke de la aŭtobuso.

Post sestaga tenduma ekskurso ni revenis al Vankuvero por

forflugo. Ĉar tiam inter Vankuvero kaj Pekino ne estis ĉiutaga rekta linio kaj ni devis atendi du tagojn ĝis forflugo al Tokio kaj tie preni ĉinan aeroplanon. S-ro Winn Zacherl kaj lia edzino varme invitis nin pasloĝi en ilia hejmo.

La sestaga tendumado estis tre laciga, kaj kiam ni revenis en Vankuveron, nia unua deziro estis tuj kuŝiĝi. Mi kaj miaj kolegoj enlitiĝis kaj tuj endormiĝis, sed s-ro Marie kaj ŝia patrino ankoraŭ laboris en kuirejo por prepari nian vespermanĝon. Dume s-ro Winn longe klinis sin super surbendigado de klasika muziko de majstroj. Antaŭ 20 jaroj en Ĉinio oni malofte povis aŭdi eŭropajn klasikajn muzikaĵojn, kaj mi petis s-ron Winn surbendigi por mi klasikajn muzikaĵojn de Mozarto, Ŝuberto k.a. Li bone komprenis min kaj

entuziasme plenumis mian peton. Nun mi ankoraŭ konservas tiujn kasedojn kaj foje kaj foje aŭskultas la muzikaĵojn. Aŭskultante la belajn melodiojn de la muzikaj virtuozaĵoj, mi ĉiam rememoras la gastamecon kaj helpemon de s-ro Winn kaj lia edzino.

II

Nia belga amiko sinjoro Charles Ghiselin, kiu legis EPC dum multaj jaroj, testamentis sian tutan havaĵon al la redakcio de "El Popola Ĉinio". Post lia forpaso, por esprimi dankon kaj respekton al lia granda favoro, la gvidantaro de "El Popola Ĉinio" decidis starigi en lia hejmloko Tournai novan tomoŝtonon por li kaj konfidistion al la Asocio Belgio-Ĉinio. Oktobre de 1991 mi kaj miaj du kolegoj estis senditaj por inaŭguri la tomoŝtonon.

La 9-an de oktobro de 1991, akompanate de s-ro Marcel Deprez, prezidanto de la Asocio Belgio-Ĉinio, kaj kelkaj belgaj amikoj, ni venis al la tombejo kaj havis mallongan ceremonion por inaŭguro de nova tomoŝtono. Ni prezentis al la forpasinto bukedon kaj faris paroladeton esprimante koran dankon, altan respekton kaj profundan sopiron al la forpasinto.

Poste ni vizitis kelkajn urbojn por renkontiĝi kun tieaj samideanoj. Mi klare memoras la vendredan kunsidon en la klubo "Verda Stelo" en Antverpeno. Pro manko de kontakto belgaj samideanoj ne multe sciis pri Ĉinio, kaj iuj apenaŭ sciis pri Ĉinio. Kaj dank' al la magia lingvo ni esperantistoj ĉe ambaŭ ekstretoj de la Eŭrop-Azia Kontinento proksimiĝis per vidal-vida interparolado pri diversaj temoj kaj venis al bona interkompreno.

En Antverpeno kaj Oostende mi kaj miaj kolegoj pasloĝis en la hejmoj de s-ro Ivo Durwael, s-ro Andre D'Hulster kaj aliaj samideanoj. Ili cedis al ni komfortajn ĉambrojn. En la hejmo de s-ro Andre ni tri havis po unu ĉambron, sed la gemastroj tranoktis en kanapo kaj seĝo. S-ro Andre kaj lia edzino Teresa ŝatis nomi sian hejmon "internacia familio", ĉar

en ilia hejmo pasloĝis dekoj da esperantistoj de dekelkaj landoj inkluzive de ĉinaj samideanoj. Ilia gastameco profunde kortuŝis nin.

III

En oktobro de 1999 mi havis la ŝancon vojaĝi al Japanio por ĉeesti la 86-an Japanan Esperanto-Kongreson kiel delegito de la Ĉina Esperanto-Ligo. Antaŭ kaj post la kongreso, krom pasloĝi en hotelo, mi pasloĝis ankaŭ en la hejmoj de japanaj samideanoj.

La unuajn du noktojn mi gastis en la hejmo de s-ro Isino Yosio, sekretario de la Japana Esperanto-Instituto. Li profunde impresis min per sia solida kaj sindonema laboro en la oficejo de JEI. En tiuj noktoj li laboris ĝis tre malfruaj horoj pro la preparado por la kongreso.

Forpasis jam kelke da monatoj, sed la afablaj samideanoj Takeuti, Isino, Nagase, Suzuki, Ikai, Miyake, Nisimoto, ges-roj Osioka... de tempo al tempo reaperas en mia memoro.

Hirosimo estis la lasta punkto en mia itinero. Tie mi pasigis du agrablajn tagojn ĉe sinjoro Osioka. En tiuj tagoj mi ĉiam estis en lia bona prizorgo kaj akompano. Mi havis tre plezurajn ekskursojn al la famaj pitoreskejoj en akompano de entuziasmaj ges-roj Osioka. Ili faris sian hejmon Hirosima Esperanto-Centro. Pli ol 100 samideanoj de 30 landoj gastis en ilia hejmo, kaj foje eĉ 11 gastoj



Ĉinaj gastoj antaŭ la domo de s-ro Andre kaj lia edzino Teresa

samtempe venis al lia hejmo. S-ro Osioka gaje diris al mi, ke tiam ĉie sur la plankoj en lia hejmo estis litaĵoj.

Mi pasigis du vesperojn en renkontiĝo kun gajaj kaj entuziasmaj gejunuloj de Hirosimo. Menciinda estas kortuŝa faro de s-ino Tao Yoriko. Antaŭ dekelke da jaroj ŝi vizitis Ĉinion. Kiam ŝi aŭdis, ke ĉina samideano gastos en la hejmo de Osioka, ŝi veturis de malproksime por vidi min. Ŝi ne estas esperantistino, aŭ nur plej komencanta komencantino, sed interesiĝas pri Esperanto kaj simpatias al la movado. Ŝi alportis du pezajn fotoalbumojn por montri ilin al mi kaj aliaj samideanoj. Ŝi multe fotis ĉinajn pejzaĝojn, antikvajn konstruaĵojn kaj scenojn de la ĉiutaga vivo de ordinaraĵoj ĉinoj. En tio mi vidis la scivolemon kaj intereson de japanaj popolanoj pri Ĉinio. La gajaj gejunuloj multe demandis pri Ĉinio, kaj mi laŭeble respondis al ili per facile kompreneblaj vortoj. Sendube la renkontiĝo en du vesperoj tute ne estis sufiĉa por pli multe konigi la japanajn gejunulojn pri Ĉinio, kaj kiam iuj el ili esprimis la deziron iam viziti Ĉinion, mi ĝoje promesis doni eblan helpon al ili.

En akompano de s-ino Taeko mi vizitis la mondfaman Pacmemorigan Muzeon. Pri milito kaj atombombo mi kaj gesinjoroj Osioka havis malkaŝan interparoladon kaj la saman volontecon pene disvastigi Esperanton por la mondpaco.

* * * *

Dum miaj eksterlandaj vojaĝoj, aŭ mi sola aŭ mi kaj miaj kolegoj kune pasloĝis ankaŭ en la hejmoj de aliaj tre afablaj samideanoj, sed bedaŭrinde en limigitaj paĝoj mi ne povas rakonti pri ĉiuj miaj gastigantoj. Mi kaj miaj kolegoj kune vojaĝintaj eksterlande ĝoje memoras la agrablajn tagojn ĉe la samideanoj kaj ŝuldas al ili multajn dankojn. Ilia sindonemo por Esperanto ĉiam restos en mia memoro. Mi estas feliĉa, ke mi posedas Esperanton. Mi volantas pene labori por la idealo de nia lingvo. ■

Por paco kaj progreso de l' homar' pli vigle agu ni en solidar' !

— Celebre al la Ora Jubileo de EPĈ

de LAŬLUM¹

EPĈ ĝojas pro la Ora Jubileo
Jubilas ni, jubilas vi, jubilas la armeo
De ĉiuj esperantoj, veraj batalantoj
Por amikeco, por mondpaco, por
progres-ideo!

EPĈ enmondiĝis sekve al ĈPR²,
Aŭdigis monde l' voĉon de la ĉin-popolo
Strebanta por konstru' de l' nova respubliko,
De bela estonteco, kun firmeĝa volo.

Afero nova, senspertuloj, alta celo...
La sun' apenaŭ brilis, nuboplenis la ĉielo.
Por forĝi la ŝlosilon de l' estonto bela,
La aspirantoj penis ŝvite per martelo.

Komenco bona, laboro duona.
Sed malfacilis la komenco.
Eĉ mankis manoj, mankis la rimedo mona.
Sed forta volo estas plejpotenco.
Kaj kie estas volo, tie estas vojo.
EPĈ ektorentis kiel monta roĵo.
Hodiaŭ ĝi fariĝis jam rivero
Sufiĉe larĝa de l' patrio en prospero,
Afero por fiero, plenas ni de ĝojo!

Ho, kvindek jaroj!
Ja duonjarcento!
Kiom da faroj kaj eraroj!
Kiom da mond-eventoj!
Mi venis al ĝi nigrahara,
Nun prujn-tempia mi fariĝis;
Mi eklaboris por ĝi nur 27-jara,
Sed nun mi 77-jariĝis...
EPĈ iĝis mia viv-destino,
Kaj ŝi unika estis mia korinklino.
EPĈ estis mia metiinstruisto,
EPĈ estis mia sportoplaco.
Ĝi faris min konstanta optimisto,
Ĝi hardis min senlaca por la sankta paco.
Tutkore mi jubilas por la granda Jubileo,
Kune kun vi, kun li, kun ŝi, kun la tuta



La aŭtoro

esperant-armeo!

En tiu ĉi momento,
Mi rememoras pri l' juneco:
Venlo Fon majstre min instruis pri la
Fundamento
Kaj Esperanto faris min jun-edzo³.
Li min alvokis al EPĈ.
Kun Ĉ. Ĉen, Honfan kaj li en la redakcio
Laboris akurate ni kiel horloĝo.
Nin helpis Tikos, S. J. Zee, Pandiŝo, Maier,
Censinio...
Kaj Kavenius, kaj Adamson, Burda Rudolf,
Schodel, Kondor,
Mijamoto, Jui Ĉunoŝin.....de diversaj landoj
kaj nacioj.

UEA helpis per la delegita reto,
SAT per sia jarlibro kun la adresaro,
Utilis ankaŭ la Heroldo-anoncetoj,
Amikoj novaj kaj malnovaj en kunstaro...

Iom post iom kolektiĝis la taĉmento
Por la komuna eksperimento.
Kaj la afero iris ŝancelpaŝe, pene.
Neatendite ĝin stumbligis incidento:
GDR malpermesis EPĈ-eniri!
Kaj oni lasis sin al ni eĉ diri:
"Jam ĉesu! Esperanto jam plenumis
La taskon historian!" Kiel miri!

EPĈ paŭzis, mutis kun bedaŭro...
 Sed ŝi silentis ne por longa daŭro.
 La historio donis al ŝi forton kaj subtenon,
 Ŝi reviviĝis, pli kaj pli beliĝis en la Esperanto-
 flaŭro.

Retrorigardu al la 50 jaroj:
 Kiom da floroj, fruktoj kaj misfaroj!
 Plej kara, laŭ mi, estas nia sperto,
 Ke plej plej gravas nia amikaro.

Adamson kaj Kavenu ne nur distribuis
 EPĈ-n, ankaŭ multe kontribuis
 Per tradukado de EPĈ-artikoloj,
 Al sveda, finna gazetaroj kaj influis
 Tre bone per la plumlaboroj.
 Zalupsky, Rudolt, Kovaĉev en Ĉeĥio kaj en
 Bulgario
 Fortiĝis la amikecon inter tiuj landoj kaj Ĉinio.
 Paraĝe energie peris EPĈ en Britio,
 Robineau distribuis kun fervoro en Francio,
 Jui Ĉunoŝin kaj Ĝisuke Takenaka... en Japanio,
 Gruŝko kaj Palu en la eks-Sovetunio...
 EPĈ en pli ol 500 urboj de USSR,
 Vere mirinda distribu-laboro!
 En eksa Jugoslavio dumil abonantoj!
 Naciaj societoj, lokaj rondoj de diversaj landoj
 Fariĝis EPĈ-amikoj kaj perantoj...

Post la apero preskaŭ de ĉiu numero
 De l' kara ruso Dancis venis tuj letero
 Ofte tre dika kvazaŭ por la amatino,
 Sed plena de konsiloj pri lingveroj.
 Iuj legantoj montris la gazeton en fenestro,
 Aliaj gvidis EPĈ-legrondon kiel ĝia estro.
 Iu leteris, ke li atendadas kun sopiro
 Alvenon de EPĈ kiel enamiĝinta viro.
 Multaj legantoj de EPĈ helpis per proponoj,
 Amikaj kritikoj, kaj konsiloj kaj admonoj...

Ĉunoŝin decidis noble sin bruligi por protesto
 Kontraŭ l' invad' al Vjetnamio, kontraŭ l'
 pesto.
 Antaŭ la martiriĝo li plu zorgis pri EPĈ —
 Novan peranton li proponis per la propra
 voĉo.

Kaj Takenaka brile plenumadis lian volon,
 Kvin centojn da abonoj varbi li sukcesis,
 Fidele li ludadis sian perant-rolon.
 Ja dank' al li kaj la similaj EPĈ progresis.

Belga amiko Ghiselin estis ordinara
 Esperantisto kaj EPĈ-leganto kara.
 Li testamentis al la redakcio
 Sian havaĵon kun valoro plurcentmil-dolara!

Kortuŝis min la legantoj per amikaj gestoj,
 Sinceraj laŭdoj kaj proponoj dum ĉeesto
 De la kunsidoj de legantoj de EPĈ
 En Kamakura⁴, Beijing, Varsovio... Atesto
 Pri vera solidaro en tutmonda manifesto.

Solidareco estas font' de forto.
 Dependas de ĝi la gazeta sorto.
 Se ĉiuj geamikoj kune klopodados,
 Prospere kreskos EPĈ sen morto.

Okaze de la jubilea jar'
 Pli vigle agu ni en solidar'!
 EPĈ multe brile kontribuu
 Al paco kaj progreso de l' homar'!

1. Akademiano kaj antaŭa vicĉefredak-
toro de EPĈ
2. Mallongigo de la Ĉina Popola Respubliko
3. Esperanto konatigis min kun mia edzino
Tonĉin.
4. Japana antikva urbo, kie okazis la 69-a
Esperanto-Kongreso de Japanio



En la nomo de la EPĈ-anoj Tan Xiuzhu prezentas florojn
 al la tomo de belga samideano Charles Ghiselin.

Amikaj renkontiĝoj



Junaj e-istoj el Eŭropo gastas en la redakcio de EPĈ.



Belga E-delegacio ĉe EPĈ en 1992



Kunsido de EPĈ-anoj kaj -legantoj en Pekino (1994)




Nia japana amiko Miyamoto Masao (la dua de maldekstre) kaj peranto Takenaka Gisuke (la tria de maldekstre) sur la Granda Muro (1985)



Raportistino Xiang Hong kaj korea e-isto Ma Young-tae



Usonaj kaj japanaj e-istoj en la redakcio de EPC (1995)



Prof. Lee Chong-Yeong en la redakcio de EPĈ



EPĈ-kunsido
dum la Unua
Azia
Kongreso de
Esperanto en
Ŝanhajo



S-ro Dai
Song'en,
antaŭa
vicĉefredaktoro
de EPĈ

Amikaj renkontiĝoj



Niaj francaj perantoj



Nia aŭstria peranto Leopold Patek



Tan Xiuzhu vizitas nian malnovan germanan peranton Karl Maier dum la 84-a UK.



Laŭlum (dekstre) kaj vjetnamaj e-istoj dum la Unua Azia Kongreso de Esperanto en Ŝanhajo



En libroservo de EPC
dum la Unua Azia
Kongreso de
Esperanto en Ŝanhajo

Benriĉa aktiveco de EPĈ dum 50 jaroj

de BRUNO VOGELMANN*

MIA intereso pri Ĉinio kaj ĉinoj vekitas jam komence de la jarcento. Lerninte Esperanton en 1926, mi baldaŭ korespondis kun ĉinoj. Nur dum la faŝismo, kiam mi estis en koncentrejo kaj dum kiu Esperanto malpermesitis, la interrilatoj interrompitis.

Post 1945 mi denove kontaktis kun ĉinoj. Kiam aperis la revuo EPĈ, mi legis ĝin dum jardekoj kaj ĝojis pri la multflankeco de ĝiaj artikoloj kaj raportoj, ankaŭ pri la bela aspekto de la bonguste ilustrita kajero. Aparte interesaj mi trovis la altkvalitajn tekstojn pri la evoluo pri la lando, popolo kaj sciencoj, kiuj profundigis miajn sciojn pri la ĉina kulturo.

Mirige estas, ke EPĈ raportis regule pri la vivo de la multaj etnaj minoritatoj, kiuj ĝuas specialajn avantaĝojn por sekurigi ilian pluekzistadon, kulturon kaj lingvojn. Mi mencias tiurilate, ke iliaj familioj rajtas havi pli ol unu infanon.

Menciinda estas ankaŭ la bona stilo de la teksto kaj la klopodo atenti pri ĝusta gramatiko de Esperanto.

Tre rimarkinda estas la zorgo de EPĈ pri regula tradukado de la altkvalita ĉina literaturo en Esperanton. Tiamaniere kreas verkojn, kiuj tradukitas ekstreme sencofidele, ĉar la ĉinaj tradukantoj konas ja pli bone la sencon de vorto aŭ frazo ol ne-ĉino. Ili ankaŭ lernis per Esperanto la precizan sencon de

la Esperanto-vortoj. Rekta tradukado el nacia lingvo en alian nacian lingvon ofte enhavas senco-erarojn.

Kiam la ĉina Esperanto-movado komencis partopreni la Universalajn Kongresojn de Esperanto, multaj novaj kontaktoj realiĝis.

Ni aliaj esperantistoj estis tre kontentaj, ke la granda ĉina nacio reprezentatis sur tiu ĉiujara impresa manifestacio de la Esperanto-movado. Ĉar la malfermo de Ĉinio por Esperanto havas grandan signifon. Ĝi donas fortan pruvon, ke homoj el lingvo-regionoj kun tute alimaniere konstruitaj lingvoj kapablas facile interkompreni kvazaŭ apartenante al sama popolo kaj sen la penplena, ofte dekjara lernado de fremda lingvo, sed post tre kurtempa lernado. Per tia subteno de la Internacia Lingvo Ĉinio kontribuas altgrade al alproksimo de homoj el plej diversaj landoj kaj helpas certigi pacon.

Ĉinio subtenas Esperanton eĉ malgraŭ la momenta disvastigo de la angla, kiu servas momente certgrade kiel mondlingvo en scienco, tekniko kaj ekonomio. Sed en estonteco la malavantaĝoj de la angla estas tro pezaj, pro malfacila ortografio kaj gramatiko, pro la altaj kostoj por tradukado kaj interpretado kaj fine ĉar la angla apenaŭ ebligas ke ĉiu homo vere regas



la anglan tiom perfekte, ke li kapablas diskuti pri seriozaj temoj, ne nur pri ĉiutagaj etaj bezonoj en sia profesia faklingvo. Krome la kostoj de ne-anglo-amerikanoj pro lernado, tradukado kaj interpretado estas enormaj, en 1974 jam taksitaj en Germanio je 10 miljard USDolaroj. Do la ĉina registaro zorgas, ke Esperanto ankaŭ nuntempe lernatas, ĉar la situacio iam ŝanĝatos.

Dum mia prelegvojaĝo tra Ĉinio en 1984 mi povis ne nur fari prelegojn pri naturprotekto en kelkaj universitatoj sed ankaŭ diskuti kun multaj ĉinaj esperantistoj en pluraj partoj de la lando kaj konstatis viglan aktivecon en la provincoj: Ekzemple en Chongqing la loka Esperanto-Asocio eldonis mem librojn en Esperanto. Kaj en Nanchang prof. Gu Jianhua kreis "Ĉinmedicinan Terminaron" en 4 lingvoj: ĉina-Esperanta-angla-franca. Aliaj esperantistoj realigis vendon de ĉinaj varoj en eksterlando pere de Esperanto. La Ĉina Esperanto-Eldonejo en Pekino eldonis inter multaj aliaj libroj la gravan "Internacia Komerca-Ekonomika Vortaro" en 11 lingvoj. Mia verko "La Nova Realismo" aperis eĉ plurfoje. Unu eldono aperis dulingva, en la ĉina kun Esperanto. Estus tro rakonti pri ĉio.

La sukcesa laborado de la ĉina Esperanto-movado, elstara tiu de EPĈ, donas al mi la esperon, ke Esperanto ne pereos, sed pluvivos kaj disvastiĝos, lante aŭ rapide, fine je beno de la homaro.

Dankon al ĉiuj kunlaborantoj de EPĈ, kies kajeroj ĝojigas min ĉiumonate. ■

* Honora membro de UEA kaj aŭtoro de "La Nova Realismo"

Pluan longan vivon al "El Popola Ĉinio"

de MARJORIE BOULTON*

KIAM mi estis ĉirkaŭ naŭjara, oni kondukis min, por edifo, al ia prezentado de infanoj, instruitaj de tieupokaj kristanaj misiistoj. (La nuntempaj kutime estas pli komprenemaj kaj taktaj.) Pluraj infanoj drame prezentis la mizeran sorton de aliaj infanoj, tiel misfortunaj, ke ili naskiĝis en landoj nekristanaj. Ĉiujn tiujn landojn oni prezentis tute negative: mi eĉ nun memoras, kiel emocie kaj firme unu knabineto preparolis la hororon de infaneco en Ĉinio, kie plene regis opio.

Kompreneble, tio estis dum la epoko de daŭra imperiismo brita. La aroganteco estis probable tute nekonscia.

Kiam mi estis studentino en Oksfordo, por la unua fojo mi vidis bonajn librovendejojn. En 1942 mi aĉetis libron de tradukoj el ĉina poezio, faritaj de Arthur Waley; ili tiel plaĉis al mi, ke mi baldaŭ aĉetis duan volumon, kaj longe poste, en 1949, ĝoje aĉetis trian volumon. Kompreneble mi ne povas taksii la precizecon de la tradukoj; sed tiuj volumoj montris kulturon delikatan kaj varian, kaj homojn, kies emocioj kaj problemoj tre similas al tiuj de britoj. Kaj en epoko plejparte post-imperiisma, britoj ofte pli lerneme kaj simpatie esploris diversajn kulturojn.

Britoj ĝenerale, post la mondmilito, iĝis pli simpatiaj al ĉinoj, pro bona kaj interesa kuirado! Nuntempe britoj multe manĝas ĉine aŭ hinde. Mi scias pri almenaŭ dek unu ĉinaj restoracioj nur en Oksfordo, kie mi nun denove loĝas, kaj tre bona ĉina vendejo de manĝobjektoj. De tempo al tempo oni spektas ĉinajn

filmojn en la televido, kaj la mirinda nacia cirko vizitis Brition — mi vidis ĝin, apenaŭ fidis proprajn okulojn, aĉetis ankaŭ videobendon...

Sed esperantistoj ĝuas pli larĝajn kontaktojn. Mi eklernis Esperanton en novembro 1949. Nia lingvo malfermis la mondon laŭ tute unika stilo: ni povas renkonti alilandanojn egalece, amikece kaj ofte solidarece. Dum multaj jaroj mi estis en amika rilato kun la poeto Armand Su, ĝis lia malapero en malliberejon; denove, post lia liberiĝo, frakasita sed ankoraŭ esperantisto. Mi kredas, ke por serioza esperantisto, fremdaj landoj estas pli vere realaj, ol por la plimulto. Vivostiloj, etiketoj, aspiroj, eblecoj malsimilas, sed homaj koroj povas esti surprize similaj kaj proksimaj.

Dum la alproksimiĝoj, kiujn Esperanto ebligas, ofte aperas intelekto stimula kaj kortuŝa dialektiko inter niaj malsimilecoj kaj niaj similecoj.

Mi dum multaj jaroj estis abonanto de "El Popola Ĉinio", foje ricevis ĝin donace. Ĝi trairis plurajn epokojn, sed restis tre bele produktita — bone presita, dece aranĝita, tre riĉa je belaj kaj nebanalaj bildoj; en Britio ĝi ofte faras bonan impreson pri Esperanto, same kiel "Monato": jen vera gazeto komparebla kun nacilingvaj gazetoj. Kaj tiu gazeto tre prezentis al alilandanoj modernan Ĉinion, kun industriaj, sciencaj, medicinaj progresoj, klerigado, kulturaj aktivoj, ankaŭ belaĵoj de la lando mem — montoj, riveroj, floroj, lagoj... kaj homoj laboremaj kaj progresemaj. Grandparte estis Esperanta gazeto plena de esperoj.

Sed venis epoko, kiam ĝi iom ŝokis min; epoko, kiam multaj ĉinoj mem estis opresitaj per registaro tro severa kaj limigema; mi ne povas vere imagi, kiel ĉinaj esperantistoj



ĉe la nacia asocio kaj la gazeto devis manovri kaj takti por savi ion kaj sin mem. Kaj estis epoko, kiam "El Popola Ĉinio" restis tre bone prezentita, ankoraŭ elstare kompetenta, eĉ ekzemple, lingve; sed por okcidentanoj estis tro dogmema, tro simpligema, kaj, plej bedaŭrinde, plena de malamo, precipe kontraŭ Usono kaj ĝiaj aliancanoj. Mi nemiam enamiĝis en la usonan politikon, sed obsedaj kaj senproportiaj malamoj neniam helpas la homaron.

Feliĉe, tiu ekstrema kaj ofte kruela reĝimo finfine malaperis, kaj mia amiko Armand, kaj multaj aliaj senkulpaj ĉinoj, reaperis... kaj baldaŭ "El Popola Ĉinio" denove iĝis bela, valora kaj kuraĝiga Esperanta gazeto plena de interesaj artikoloj kaj bildoj. Ĝi estas vere elstara kontribuado al nia internacia kulturo. Mi deziras al ĝi pluan longan vivon kaj larĝan legantaron. Al nia Esperanta mondo ĝi sciige kaj sincere prezentas la plej vastan popolon en la mondo. Salutojn al ĝi kaj al tiuj, kiuj tiel serioze kaj dediĉite laboradas por ke ĝi estu tiel altnivela! ■

* Honora membro de UEA kaj membro de Akademio de Esperanto.

Tion mi nomas neelĉerpebleco

de BALDUR RAGNARSSON*

ELDONADO de Esperantaj revuoj estis ĉiam kaj daŭre estas riska afero. Abonantoj estas malmultaj kaj nestabilaj kaj eldonaj kostoj konstante prezentas problemojn. Redakcioj tial facile malesperas kaj emas perdi la energion necesan por la antaŭensvingo, kiun postulas ĉiu nova numero.

Tamen estas esceptoj. Sur la florara kampo de la Esperanta gazetaro elstaras El Popola Ĉinio kvazaŭ triumfa signo de venko el la futuro, signo de venko por Esperanto. Ĝia eldonado estas stabila, ĝiaj abonantoj fidelaj, ĝia redakcio ŝajnas ĉiam elane pretaj.

Ĉi tiujn faktojn oni povas konsideri kiel bazajn. Disvolvi ilin pliklarige estus tasko iuparte relative facila, aliparte komplika. Estas facile kompreni kial la legantoj de EPĈ ĝin tiom ŝatas, tion garantias kaj la eminente faka prilaboro kiu tiom elstaras lingve kaj aspekte, kaj la aktuala kaj daŭrvalora enhavo de la revuo. Pri la eldona stabileco la klarigoj sendube estus pli komplikaj, financoj rilate al kulturaj aferoj ĉiam estas.

Sed estu kiel ajn, EPĈ nun celebras sian 50-jariĝon kaj la revuo



estas pli ŝatinda nun ol iam ajn, pli temvaria, pli ŝikaspekta. Malgraŭ sia aĝo de digno ĝi elspiras junecon de aŭtentiko sen truda apogo de stilizita propagando.

Ĉion konsiderinte, unu fakto daŭre memorigas pri si kiel la ŝloŝilo al la fenomeno EPĈ. Tiun fakton mi volas nomi neelĉerpebleco. Iel oni povas

envii redakcion, kiu povas senfine ĉerpi el la mistera fonto, kiu estas la milmiljara historio kaj kulturo de la ĉina popolo kaj la nuntempa rapida disvolviĝo de ties neelĉerpebla energio. Ke diskonigado kaj interpretado de tiaj komplike gigantaj faktoj havas sian indan esprimadon en la internacia lingvo pere de tia elstara revuo

kiel El Popola Ĉinio estas aparte ĝojiga kaj aplaŭdinda je tiu ĉi tempopunkto.

Mi deziras al la revuo kaj ĝia redakcio pludaŭre brilan prosperon en la venontaj jaroj. ■

* lama vicprezidanto de UEA

Estu plu firmaj viaj paŝoj

de SABIRA STAHLBERG*

Karaj kolegoj, karaj amikoj,

"El Popola Ĉinio" staras jam de 50 jaroj kiel brilanta stelo sur la ĉielo de la Esperanta gazetaro. Tra tempoj facilaj kaj malfacilaj ĝi brilis senĉese, portante al siaj legantoj senkomparajn plezuron kaj sciojn. Tial nun, kiam tiu ĉi mirinda revuo festas sian jubileon kaj 500-an numeron, mi deziras tutkore gratuli al ĝi kaj al ĉiuj redaktoroj, korektistoj, fotistoj, aŭtoroj kaj aliaj, kiuj dum la jardekoj sindediĉe laboris kaj laboras por ke ĝi ĝustatempe kaj regule atingu siajn legantojn. Profundan dankon kaj admiron mi deziras esprimi al ili ĉiuj, esperante ke la vojo de EPĈ estos ĉiam luma en la estonteco.

Mia persona rilato kun EPĈ komenciĝis en la jaro 1986. Post la

granda Universala Kongreso en Pekino aperis mia foto en la revuo — juna kongresano el eksterlando... Du jarojn pli poste mi jam troviĝis en Pekino kiel studento pri Ĉinio. EPĈ de post tio ne ĉesas ĉeesti en mia vivo. Mi verkis por ĝi, oni artikolis pri mi, mia libro "Malantaŭ la muro — puzleroj pri Ĉinio" (verkita en 1994) recenziĝis... Ĉu alia revuo estis tiel konstanta en mia vivo? Eble nur Kontakto, kies redaktoro mi nuntempe estas.

Kun la jaroj EPĈ vidis multajn ŝanĝojn. Hodiaŭ EPĈ estas senkompare la plej bela, ampleksa kaj kolorriĉa revuo en Esperanto.



Kiel kolego mi povas nur humile riverenci antaŭ EPĈ-redakcio, kiu plenumas nefacilan — mi eĉ kuraĝus diri preskaŭ neeble — labortaskon. Ĉinio estas grandega lando kun multaj diversaj popoloj kaj kutimoj, ĝia naturo vasta, ĝiaj socio kaj ekonomio rapide disvolviĝantaj. Priskribi eĉ peceton de ĉio ĉi estas ne facile.

Priskribi por eksterlandanoj estas eĉ pli malfacile. Kaj tamen, la kunlaborantaro de EPĈ sukcesas. EPĈ impresas kiel harmonia tuto, kun artikoloj kaj verkaĵoj pri ĉiuj anguloj de Ĉinio. Tiel, EPĈ valore kontribuas al la kompreno de la ekstera mondo pri Ĉinio. Kaj se okazus konkurso pri kvalito kun nacilingvaj revuoj, EPĈ sendube atingus pintan pozicion.

Mi deziras al EPĈ multan sukceson kaj forton. Estu plu firmaj viaj paŝoj kaj buntaj viaj paĝoj! Korajn gratulojn al la 50-jara EPĈ kaj longan vivon al ĝi! ■

* Redaktoro de Kontakto, eksperto pri Ĉinio, verkisto, tradukisto kaj eldonisto

Energiaj emeritoj de "El Popola Ĉinio"

Antaŭ kelkaj jaroj ili emeritiĝis, tamen ilia fervoro por la revuo neniom malpliĝis

de XIAO PING

ESTAS ĉinaj antikvaj versoj: "Ĉevalo kvankam senila, restas tamen ambicia." Per ili oni povas priskribi ankaŭ la aspiriplenajn emeritojn de la redakcio de "El Popola Ĉinio".

POR PLIBONIGI LA REVUON

"El Popola Ĉinio" havas pli ol 30 emeritojn, kiuj plejparte aĝas pli ol 60 jarojn, el kiuj 12 estas pli-ol-70-jaraj kaj la plej aĝa havas jam 92 jarojn. Antaŭ sia emeritiĝo ili ne nur oficis por "El Popola Ĉinio", sed ankaŭ kumulis aliajn laborojn.

Post sia emeritiĝo ili daŭre prizorgas kaj subtenas la laboron de nia redakcio diversmaniere. Iuj ofte atentigas la funkciulojn de la redakcio, ke ili multe publikigu artikolojn pri la vivo de ordinaraĵoj ĉinoj kaj la ĉina kulturo. S-ro Yang Rumo, antaŭa vicĉefredaktoro, daŭre sin okupis je polurado de la ĉinaj originaloj de la revuo post sia emeritiĝo en 1993. Lia seriozeco kaj erudicieco estas alte taksataj de la kolegoj. La antaŭa ĉefredaktoro Ĉ. Ĉen emeritiĝis jam en 1983 kaj nun aĝas 87 jarojn, tamen li neniam ĉesigis verkadon. Lia artikolo "Ĉu la ĉina lingvo malfacila?" kaj aliaj artikoloj pri ĉinaj proverboj, idiomaĵoj, eŭfemismoj, aludoj, naciaj moroj kaj kutimoj ne nur forte odoras ĉinan kulturon, sed ankaŭ estas tre interesaj kun sia originala gusto.

S-ro Li Shijun (Laŭlum),

membro de la Akademio de Esperanto kaj antaŭa vicĉefredaktoro de nia revuo, diris, ke por bone redakti la revuon, oni nepre devas rafini la rubrikojn pri Esperanto. Li ofte verkis por la revuo, krom recenzo, ankaŭ novelojn, poemojn kaj eseojn. Antaŭ nelonge li promesis al la Ĉina Esperanto-Eldonejo, ke en malpli ol 3 jaroj li plenumos tradukon de la fama ĉina klasika romano "Ĉe la Akvorando". En la lastaj jaroj s-ro Li Shijun gvidis du E-kursojn. Nun iuj el liaj disĉiploj jam fariĝis elitaj laborantoj por Esperanto.

Por levi la kvaliton de la revuo, s-ro Ivan Ko, iama estro de la koresponda sekcio, atente legas preskaŭ ĉiun numeron kaj sincere prezentas plibonigindaĵojn de la lingvo. La redakcio okazigas recenzan kunvenon ĉiujare por aŭskulti la opiniojn de la emeritoj. En la kunveno oni verŝas ĉiu sian koron kaj faras multajn plibonigajn proponojn. Veterana paĝaranĝa redaktoro Yang Geishou, informiĝinte, ke oni bezonas lian helpon por solvi la projektan problemon, hastis al la redakcio. Kaj post tio li prezentis al la redakcio tre utilajn proponojn.

EN ESPLORO PRI LA ĈINA E-MOVADO

En la pasintaj 100 jaroj, post kiam Esperanto enkondukiĝis en Ĉinion, pioniroj de la ĉina E-movado publikigis serion da valoraj artikoloj. En la 90-aj jaroj aro da veteranaj esperantistoj faris kolektadon kaj ordigon de koncernaj materialoj. S-ro Xu Shanshu, iama

vicdirektoro de la redakcio de "El Popola Ĉinio", kolektis kaj ordigis disertaĵojn, leterojn kaj aliajn artikolojn de Bakin pri Esperanto kaj kompilis la libron "Bakin kaj Esperanto". Tiun libron eldonis la Ĉina Esperanto-Eldonejo (ĈEE) en 1995. En la sama jaro s-ro Liu Ling kolektis kaj ordigis disertaĵojn kaj leterojn de Ĵelezo pri Esperanto kaj reformado de la ĉina skriblingvo kaj kompilis "Verkoj de Ĵelezo", kiu estis eldonita ankaŭ de ĈEE.

Poste s-ro Hou Zhiping, antaŭa vicdirektoro de la redakcio de "El Popola Ĉinio", kompilis la libron "Hujucz kaj Esperanto", en kiu kolektiĝis disertaĵoj kaj leteroj de Hujucz, grava figuro de la kultura rondo en la moderna epoko de Ĉinio kaj eminenta gvidanto de la ĉina E-movado.

Por memori kaj resumi la centjaran E-movadon en Ĉinio, veteranaj esperantistoj iam laborantaj en la Ĉina Esperanto-Ligo (ĈEL) kaj redakcio de "El Popola Ĉinio" kaj samideanoj de la Pekina Esperanto-Asocio faris en 1999 multe da laboroj por kolekti kaj esplori materialojn kaj fine eldonis la libron "100 jaroj de Esperanto en Ĉinio". La libro konigas la disvastigon de Esperanto en diversaj kampoj de Ĉinio, ĝian aplikadon kaj la jam akiritajn atingojn. La libro estas utila por esplori la ĉinan E-movadon.

AMI POR ETERNE

Por la homoj, kiuj laboris por "El Popola Ĉinio" kaj nia lingvo, la revuo estas kristaliĝo de ilia amo kaj la lingvo Esperanto —

nemankigebla enhavo en ilia vivo. Tio decidis, ke ili dediĉos sian tutan amon al tiu laboro.

S-ro Li Naixi, eksa asista ĝenerala sekretario de ĈEL, jam atingis 92 jarojn. Li eklernis nian lingvon en 1928. Li gvidis la redakcion de "El Popola Ĉinio" en 1958-1965. En 1979 li eklaboris en ĈEL. Li partoprenis fondon de la Ĉina Esperanto-Eldonejo kaj la revuo "La Mondo", preparon de la 71-a UK en Pekino kaj preparon de 8 E-kursoj de universitataj instruistoj. En 1987 li emeritiĝis, sed daŭre donis atenton al la laboro de ĈEL. Li ofte korespondas kun gvidantoj de lokaj asocioj kaj publikigas siajn opiniojn pri la movado en la revuo "La Mondo".

S-ro Liu Ling, iama aganta ĝenerala sekretario de ĈEL kaj gvidanto de la Esperanta sekcio de ĈEE, emeritiĝis en 1991. Li bone kunorganizis la 2-an Ĉinan Kongreson de Esperanto kaj la 5-an Pacifikan Kongreson de Esperanto. Somere de 1996, komisiite li, 70-jara maljunulo, komencis prepari la Esperanto-Bibliotekon sub ĈEL. Malgraŭ tio, ke li suferis de hipertensio kaj kormalsano, li faris grandan laboron por la preparo. ĈEL havis grandan kvanton da E-eldonaĵoj, kiuj dum longa tempo ne estis ordigitaj. Liu Ling registris ilin, faris karton por ili kaj enkomputerigis la donitaĵojn de ĉiu el ili. Post duonjara penado la biblioteko inaŭguriĝis en la Zamenhofa festo kaj s-ro Liu mem ekfunkciis kiel ĝia respondeculo. Nun li servigas la ordigitajn librojn al samideanoj de diversaj lokoj de Ĉinio. Li planas daŭre ordigi la eldonaĵojn kaj enretigi ilin. S-ro Zou Guoxiang, antaŭa vicĉefredaktoro de EPĈ, emeritiĝis en 1995. Nun li estas vicprezidanto de ĈEL kaj ĝenerala sekretario de la ĉina societo "Amikoj de Esperanto". Li gvidis la 3-an kaj 4-an Ĉinajn Kongresojn de Esperanto kaj partoprenis la organizadon de la 1-a Azia



S-ro Xu Shanshu (la unua de dekstre), eksa direktoro de EPĈ

Kongreso de Esperanto. Li respondecas ankaŭ pri la laboro de "La Mondo". Por E-movado en diversaj lokoj de nia lando li ofte veturas aliloken, interkonsiliĝas kun respondeculoj de lokaj organizoj por solvi iliajn

malfacilojn.

Supre mi menciis nur parton de la emeritoj de nia redakcio. Nun, kiam mi finas la artikolon, mi esprimas koran bondeziron al ili. Feliĉon kaj longan vivon al ĉiuj, kiuj laboris por nia revuo. ■

ABONKOTIZO DE *EL POPOLA ĈINIO* POR 2000

Lando	Valuto	Abonprezo	Sendokosto	Pagenda sumo
Aŭstralio	AUD	19	24	43
Brazilo	USD	12	6	18
Bulgario	USD	10	6	16
Britio	GBP	10	12	22
Eŭro-landoj	EUR	12.80	16	28.80
Francio	FRF	84	108	192
Germanio	DEM	24	32	56
Italio	ITL	24000	30800	54800
Japanio	JPY	1700	2160	3860
Nederlando	NLG	28	35	63
Usono	USD	14	18	32
Vjetnamio	USD	10	6	16

1. Ĉiuj evoluintaj landoj ne menciitaj supre pagu kiel Usono aŭ Nederlando.

2. Meksikio, Singapuro kaj ĉiuj landoj en Latin-Ameriko pagu kiel Brazilo; ankaŭ Hongkong pagu kiel Brazilo.

3. Ĉiuj landoj en Azio, Afriko, Orienta Eŭropo kaj la Komunumo de Sendependaj Ŝtatoj ne menciitaj supre pagu kiel Bulgario.

4. La 11 EU-landoj kun eŭro kiel komuna mono povas pagi ankaŭ kiel Eŭro-landoj.

Por aera sendo bonvolu nepre aldoni 18 USD aŭ valoron egalan al la agenda sumo.

Verda juneco

Verdo simbolas esperon, kaj la pli junaj kolegoj alportas esperon al nia verda movado

de YU TAO*

LA kovrilpaĝo de "El Popola Ĉinio", 9-a numero, 1990, montras scenon el la festa kunveno por la 40-jara jubileo de EPC: kelkaj ĉinaj junuloj gaje babilas kun franca leganto.

Inter la junuloj estas mi, mia kunlernantino Xiang Hong k.a. Tiam ni ankoraŭ studis en la E-kurso de la Pekina Disaŭdiga Instituto. Ni antaŭvidis, ke ni probable laboros por EPC, sed tute ne atendis, ke niaj figuroj aperas sur ĝia kovrilpaĝo. Jen la sorto! Ni jam oferis nian plej belan junecon al EPC, kaj tre verŝajne, nia tuta vivo estos dediĉita al nia verda movado.

LA PLEJ JUNA GRUPO

En 1991 ni, 8 kunlernantoj, aliĝis al la stabo de la Ĉina Esperanto-Ligo (ĈEL), redakcio de EPC kaj Ĉina Esperanto-Eldonejo (ĈEE), en kiu tiam ni estis la plej juna grupo. La Esperantujo estas granda familio, kaj ni sentas, ke la redakcio de EPC tre similas al familio — niaj antaŭuloj favoras nin kiel gepatroj, kaj ni estas la plej junaj infanoj de la "familio".

En nia 8-kapa grupo la plej juna aĝis 21 jarojn kaj la plej aĝa estis 23-jara. En la redakcio de EPC Wang Hanping apartenas al nia generacio, tamen li meritis esti nia "antaŭulo". Li estas klera kaj kvieta junulo el suda Ĉinio. Jam en 1988 li membriĝis al la redakcio de EPC. En kunlaboroj ni konigis nian respektivan vojon al la redakcio.

Por ĉinoj Esperanto estas



Liu Zijia, Chen Ji kaj Jiang Limin (de dekstre)

sufiĉe malfacila preskaŭ same kiel aliaj fremdaj lingvoj, ĉar la ĉina lingvo havas tute alian strukturon. Do, levi la lingvan nivelon por profesie labori por EPC bezonas specialan studadon. Ekz. mi kaj miaj kunlernantoj estis kulturataj de akademiano Laŭlum de 1989 ĝis 1991. S-ino Tan Xiuzhu, prezidantino de ĈEL, kaj kelkaj aliaj laborantoj de EPC, ĈEL kaj E-sekcio de la Ĉina Radio Internacia studis en speciala kurso en la 60-aj jaroj. Kaj ankaŭ iuj, kiuj elstariĝis en lokaj kursoj, ekz. Wang Hanping, aliĝis al la stabo.

Antaŭ la 71-a UK en Pekino en 1986 funkciis multaj E-kursoj en diversaj lokoj de Ĉinio. Wang Hanping, kiu tiam studis en la Nankina Universitato, interesiĝis pri la interna ideo de Esperanto kaj eklernis la lingvon en koresponda kurso. En 1988, pro lia bona studo de la lingvo, la estraro de EPC invitis lin labori en la redakcio.

Kiam ni venis al la redakcio,

li jam povis bone plenumi sian taskon. Kaj ni, 8 junuloj, devis komenci de la plej bazaj laboroj, ekz. tajpado kaj provlegado. Tamen ni rapide progresis en la movado, en eldonado de nia revuo kaj Esperantaj libroj kaj en korespondado kun alilandaj legantoj...

KRESKI EN LA MOVADO

Komence de 1992 kelkaj el nia juna grupo partoprenis la 2-an Ĉinan Kongreson de Esperanto en Tangshan. Tio estis la unua granda kongreso por ni. En interparolado kun e-istoj el diversaj partoj de la lando ni havis novan konon pri nia laboro. Wang Hanping kiel raportisto verkis raportojn pri la kongreso kaj multajn artikolojn pri E-movado por EPC. Ni tre enviis lin kaj ankaŭ ni klopodis fari ion, ekz. skribi ion por "La Mondo", organo de ĈEL en la ĉina lingvo kaj Esperanto.

En Ĉinio junaj e-istoj aktivigas

en multaj lokoj, sed antaŭe ne estis landa junulara asocio, respondeca pri kunordigo de diversaj grupoj enlande kaj kontaktado internacie kun TEJO kaj alilandaj junularaj asocioj. Dank' al la inspiro kaj subteno de Sabira, tiama vicprezidanto de TEJO, kaj la estraro de ĈEL, fondiĝis en marto de 1993 la Ĉina Junulara Esperanto-Asocio (ĈJEA), kiu iĝis landa sekcio de TEJO. Mi kaj miaj kunlernantoj Wang Jianbing, Sun Aijun, Xiang Hong kaj Yin Qin elektiĝis kiel estraranoj de ĈJEA. Kune kun junaj komitatanoj kaj aktivuloj en multaj lokoj de Ĉinio ni malfermis novan paĝon de la junulara Esperanto-movado en Ĉinio.

ĈJEA ekaktivis diversflanke: ĝi okazigis kunsidojn kaj sendis reprezentantojn al IJK en Koreio, kie junuloj el Ĉinio, Japanio kaj Koreio multe kunlaboris kaj diskutis. Ili atingis interkonsenton, ke la Komuna Seminario (KS) de japanaj kaj koreaj junuloj estu renkontiĝo de junuloj de la tri landoj.

Aŭguste de 1995 okazis en Tianjin, Ĉinio, la 14-a KS. Unuafoje kunvenis junuloj el Ĉinio, Japanio kaj Koreio. ĈJEA estis la ĉefa organizanto de la 14-a KS. Ni, junuloj el la redakcio de EPĈ, multe laboris por ĝi, levis nian lingvonivelon kaj akiris sperton pri la movado.

La oran tempon de nia vivo ni dediĉis al nia verda movado. Sun Aijun multe verkis por EPĈ; Wang Jianbing redaktis "La Mondo" kaj ankaŭ kunorganizis landajn kaj internaciajn E-renkontiĝojn; Yin Qin unue laboris en la oficejo de ĈEL kaj poste tradukis por EPĈ kaj nun estas unu el la estraranoj de ĈEE; Xiang Hong nun respondecas pri kelkaj rubrikoj de EPĈ.

PLI JUNAJ KOLEGOJ

En 1997 Chen Ji, Liu Zijia kaj Jiang Limin fariĝis novaj



La aŭtoro (la tria de maldekstre en la dua vico) kaj liaj kolegoj

"familianoj" de la redakcio de EPĈ. Ili venis en la ĝusta tempo, kiam la redakcio bezonas novan forton.

En la reformado kaj pordomalfermo multe ŝanĝiĝis la koncepto de ĉinaj junuloj pri elekto de profesio. En la merkata sistemo junuloj preferas esti ĵurnalisto de famaj amas-komunikiloj, anoncisto de TV-stacio aŭ oficisto de granda kompanio. Estas fakto, ke kompare kun la ofico en la redakcio de EPĈ, iliaj postenoj alportas pli grandan enspezon kaj ricevas pli altan takson de la publiko. Iuj el la junuloj en la redakcio de EPĈ kabeis kaj ekhavis novan bone salajratan postenon. Mi kore deziras, ke tiuj miaj kunlernantoj kaj kolegoj sukcesu en la nova kampo. Mi ankaŭ ĝojas, ke ili diskonigos Esperanton al pli da rondo. Tiuj, kiuj nun daŭre laboras en la redakcio, havas pli da tasko sur siaj ŝultroj.

Ni ne forlasis EPĈ pro amo al Esperanto kaj ankaŭ pro la familieco de la redakcio de EPĈ. Verdo simbolas esperon, kaj la pli junaj kolegoj alportas esperon al nia verda movado.

Chen, Liu kaj Jiang estas feliĉaj, ĉar ili jam de la komenco povas multe sin kulturi per gravaj

taskoj kaj ricevi direktadon de la veteranaj laborantoj, kiuj tre volentas doni sperton kaj sciojn al la juna generacio.

En 1998 okazis en Pekino la 17-a KS. Jen nova defio por ni. Kun sperto de la 14-a KS kaj helpo de tiuj tri junaj e-istoj, ni prezentis pli sukcesan seminarion al la partoprenantoj. Amikoj el Japanio kaj Koreio gratulis nin pro la organizado. En libertempo ni invitis la partoprenantojn viziti la oficejojn de ĈEL, EPĈ kaj ĈEE. Kun fiero ni rakontis al ili la labor-sistemon, montris la novan komputilon kaj la iam tre utilan tajpilon, rekomendis E-librojn kaj freŝan numeron de EPĈ... Ĉio ĉi enhavas nian ŝviton.


Ni dediĉis nian belan jun-econ al EPĈ kaj la Esperanto-movado. Ni devas konfesi, ke ankaŭ Esperanto donis kaj donas multon al ni. Ni estas tre feliĉaj, ke en la 50-jara historio de EPĈ estas ankaŭ niaj kontribuajoj. ■

*La aŭtoro estas ĉefredaktoro-asistanto de EPĈ, ĝenerala sekretario de ĈEL, prezidanto de la Ĉina Junulara E-Asocio, komitatano de UEA kaj membro de KAEM.

FOTOJ FARITAJ DE E-ISTOJ



En printempo
de MARIA T.C.
RYPERT
(Nederlando)



Bovinoj en Aŭstrio
de HANS FECHLER
(Germanio)





Strando
de LUAN JAUPI
(Albanio)

Reĝa kastelo
"Wawel"
de SLAWOMIR
SZYMALA
(Pollando)



Lignisto en
Araukana arbaro
de ANA MARIA
IBANEZ
(Argentino)



ISSN 0032-4361



9 770032 436009

05>

世界语《中国报道》2006年第五期
(本刊代号: 世一第) 国际刊号: CN 11-1339